

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA LA MONDO ESPERANTO SEMAS SIAJN BONAJOJN
 PLI FACILIGAS LA KOMERCAJN INTERRILATOJN KONIGAS
 LA INDAJN ELTROVOJN KUNHELPOS POR ANSTATAVI
 DE FRUKTODONA PACO LA SANGAJN BATALADOJN
 KIUJ DISSTRAS HOMARON.



Alegorio speciale verkita de Suzoro Pillet, fama gravuristo de medaloj, se idita en la francan Roman lernejon post ricevo de l' granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2 25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo
Nuntempaĵoj : La Regna Dumo (Rusujo)	177
Diversaj Sciencoj : (Sociologio) : Bonfaremo, de <i>B^{ino} von Sültner</i> (Aŭstrujo), esp. de <i>D^{ro} Hanauer</i> (Germanujo)	178
Militistaro kaj Maristaro : La Sana Stato dum la rusa-japana milito, de <i>D^{ro} Gambier</i> (Francujo)	180
Turismo : Dauphiné, de <i>H. Sentis</i> (Francujo)	181
Pri Esperanto : Kroniko, Bibliografio, Ĉirkaŭ la Kongreso, de <i>Steleto</i> kaj <i>A. Montrosier</i>	184
Diversaĵoj : La Elsputo de Monto-Pelé (La Martiniko), de <i>Inĝro Rollet de l'Isle</i> (Francujo)	187
Virina Paĝo : La hejma Vivado de la Anglino, de <i>Fin^o C. Oxenford</i> (Anglujo)	189
Komerco kaj Industrio : La fabrikado de l' pipoj en Ĵura, de <i>Maurice David</i> (Francujo)	190
Felietono : La Torento el Ŝaŭmo, de <i>Daniel Lesueur</i> , esp. de <i>J. Flourens</i> (Francujo)	191
Artista kaj Literatura vivado : Elisabeth Barrett-Browning (Anglujo), de <i>Odilino Prudent</i>	192
Aldono (Literaturaj paĝoj) : La tragedio de l'homo, de <i>Emeriko Madách</i> , hungara poeto, esp. de <i>Arnold Göttl</i> (Hungarujo)	193
Ibrahim, Persa novelo, esp. de <i>D^o G. Busuttil</i> (Malto)	194
Ĉe l' sojlo de l'amo. Originalo de <i>Radwan-Ripinski</i> (Rusujo)	195
Virina amo, de <i>Haldor Midthus</i> (Norvegujo)	197
Miksajoj : Por la propagando, Ludoj, Amuzoj, k. t. p. de <i>Ch. Brunet</i>	196bis
Plena ilustrita enhavo de la unua jaro.	

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR Miksajoj, t. e. : ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al :

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenalore.

Oni povas ankoraŭ ricevi « Tra la Mondo » de l'unua numero.

Al niaj abonintoj.

Finante nian unuan ekzistan jaron, ni havas la rajton, ŝajnas al ni, konsideri kun kontenteco la kolekton de niaj 12 kalendaroj. Ni ne diros al vi : ni vin donis tiom da literoj por legi ! Ĉar, laŭ ni, oni ne legas literojn sed verkojn ; kaj kun milionoj da presiloj oni povas verki enuigajn aŭ seninteresajn skribaĵojn, kaj kontraŭe, kun iom malpli da ili, krei verkojn legindajn kaj pleje ŝatindajn.

Nu, laŭ la ĝenerala opinio, la intereso de « Tra la Mondo » neniel malpligrandigis, tute kontraŭe. Kaj tion ni povas diri sen falsa modesteco, ĉar ne al ni revenas la merito, sed nur al la talentaj samideanoj, kiuj, allogitaj de nia plano kaj de ĝia ĉiama efektiviĝo, akceptis senŝancele, aŭ amike proponis, kunlabori kun ni.

Ilin ni kore dankas ; kaj dank'al ili ni penados, en la estonto, konstante pliperfortigi nian revuon.

Ni ne volas citi tie ĉi la multegajn kaj tute interesajn novajn verkojn, kiuj kolektiĝis en niajn manojn, nek paroli pri la belaj ilustraĵoj ricevitaj. Nia kovrila paĝo ne sufiĉas. Oni nur sciu, ke nenia malkontentiĝo estas timinda.

Ankaŭ al niaj legantoj, kies multaj iĝis fidelaj amikoj, ni deziras doni koran dankon. Ili bonvolu kredi ke nia sola celo estas labori por kontentigi ilin, oferante revuon indan de ili, indan de nia kara lingvo, indan de ĝia glora elpensinto.

Prave ni povas diri *oferante*, ĉar nia unua jaro finiĝas per severa mona perdo. Mi tamen komencos la duan kun la sama fervoro, petante nur ke oni daŭru subteni nian entreprenon per **tuja renovigo de abono** kaj varbado de abonantoj.

Tiu ĉi numero enhavas nian tutjaran ilustritan enhavon. Ĝi formas bonegan propagandilon por nia afero kaj por « Tra la Mondo », indan je dismontro aŭ disdoni.

Ĝi estas facile enmetebla en koverton kun letereto. Oni povas ankaŭ ĝin sendi en nefermita koverto, kaj poŝtkarte aldoni kelkajn vortojn pri kaj por la revuo. Ŝajnas ke tio estas facila, je tiuj, kiuj korespondas.

Oni bonvolu tiel fari, kun la konvinko, ke oni laboros ne por ni sed por si.

Kaj nun, ĝis nia 13^a numero.

A. MONTROSIER.

Por bindi la revuon.


Troviĝas en la revuo kelkaj ilustraĵoj kusantaj sur duobla paĝo. Por ne igi nevidebla la mezon de tiuj ilustraĵoj, oni ordonu al la bindisto glui la foliojn sur paperan banderoleton (fr. onglet), kiun oni bindas kun la aliaj folioj.

Sendo de « Tra la Mondo. »

La sendo de niaj abonaj ekzempleroj estas ĉiujmonate tre akurate kaj zorge farata. Do kiam, escepte, iu aboninto ne ricevas sian numeron, la poŝtoficejoj solaj estas kulpageblaj kaj ni ne povos senpage sendi novan ekzempleron. Ni atentigas nian legataron pri tiu fakto, ke, en iaj urboj, la poŝtoficistoj ne malŝatas Esperanton kaj esperantaĵojn !!

NIA VENONTA PROJEKTITA NUMERO.

Mzab'o — Ghardia, de Leŭtenanto Lesnes (Alĝerio). — La Rochelle, de Sam. Meyer (Francujo). — La torento el Ŝaŭmo, de Daniel Lesueur kaj J. Flourens (Francujo). Infana paĝo, de J. Saks kaj Amatus (Belgujo). — La Holanda armeo, de J. H. Salomon (Holandujo). — La Vesta'ulino, de J. Flourens. — Savojo, de D^{ro} Coze — Virina Paĝo, de Roksano — k. t. p.



EN PETERBURGO.

Preparado de l' elektaj etatoj en la ĉambrego Aleksandro.



EN GATCHINA.

La Palaco de « Tauride » kie kunsidas « Dumo ».

La Regna Dumo.

« La tago de l' 10a de Majo sufiĉus, per ĝi sola, por doni karakteron novan al la komencanta centjaro: de tiu ĉi dato, la aŭtokratismo malaperis de l' civilizita Eŭropo. La simileco kun la unua kunsido de l' francaj « Generalaj Statoj », en 1789, estas tro frapanta por ne esti ĉie signalita. Grafo Witte estas alia Necker. La kontrasto de l' kortegaj uniformoj kun la kostumoj senluskaj de l' provincaj deputitoj elvokas la faman frazon de Michelet: « — ... Marŝis, fine, la nigra Bataliono de l' Tria-Stato. — »

Tia estas la komenco de tre interesa artikolo presita en la franca « *Le Journal* » sub la subskribo de l' fama diplomato, Gabriel Hanotaux, eks-ministro de l' eksteraj aferoj, artikolo kiun ni ne povas bedaŭrinde tute traduki, pro ĝia longeco. Aludante la komencon de la kunsido, S^o Hanotaux skribas: « Dum la dramo, kiu ekiĝis tuj kiam la ĉambrego de la Granda Katarino estis plenigita, tri decidigaj paroloj estis tuj eldirataj: la imperiisto, staranta kaj ne sidante, diris: *libercon*: la unua parolinta deputito, diris: *justecon*; fine la prezidanto ordonis foriri al la oficejoj uniformvestitaj. La aŭtokrataro demetas la reĝecon; la popolo krias kontraŭ l' arbitro; la burokrataro forkuras, la dorson kurbiganta, konfuzege.

« Jen la tuta revolucio. »

Jes, sed la malnovaj Rusoj kontraŭstarigis kaj la tago ne estas jam veninta por la fina sukceso de tiu revolucio.

Oni scias la okazintaĵojn jam pasintajn, la sendon de la Duma adresskribo, la rifuzon de l' caro — aŭ pli ĝuste de l' ministraro ĝin konsilanta — akcepti la delegitaron de Dumo, la saĝecon montritan de tiu ĉi je tiu cirkonstanco, la gravecon de la prisdiskutata bona demando.

La registrara respondo al la adresskribo ne estis farita por kvietigi la kaŝatan kontraŭstaton ekzistantan, tuj de la komenco, inter Dumo, tute « maldoktrama », kaj la ministraro Goremkyne, fidela barometro montranta la premon regnantan ĉe la kortego. Malgraŭ la deziro de iuj, konsideri nur kiel senatentindaj la postulojn de Dumo, la ministraro ekdiskutis la bienan demandon. Tiu partopreno kvankam ne favora, pligrandigas la konfidon en la sukceso de Dumo.

Ja, la registraro komencinta la pridiskuton, ne plu povas, estonte, eviti la reparolon. Nu la protagonistoj de l' deviga senbienigo formas grandegan plimulton en Dumo.

La 7an de Junio, Dumo okupiĝis pri ŝanĝoj alportotaj al sia leĝdonanta povo. La diskutoj estis tre akraj. Pro la graveco de la demando, ni eliros la « jenajn sciigojn de interesa letero sendita al ni de Rusujo.

Ĉe ni caro, kiel antaŭe, signifas ĉion, kaj Regna Dumo nenion. La ministroj kiel antaŭe dependas tute de caro. Plue se ia ministro enportas en Regnan Dumon ian leĝoprojekton, kaj se la Regna Dumo ĝin malakceptas, ne sole la ministro

ne eksiĝas, sed eĉ la leĝoprojekto mem moviĝas plue, — ĝis la Regna Konsilejo, en kiu kunsidas maljunigintaj oficistoj, atingintaj ministran aŭ aliajn altajn rangojn, kaj pro netaŭgeco metitaj en malsanulejon, t. e. Regna Konsilejo, por kunsidi tie kaj ricevi salajron ĝis sia morto. En kunvenon de tiuj ĉi homoj, kutimintaj rampi antaŭ caro, blinde obedi lin, transiras leĝoprojekto ekzamenita de la Regna Dumo, kvankam tiu ĉi projekto estas de ĝi malakceptita. Sed ni supozu, ke leĝoprojekto proponita de ministro estas tielmalbona aŭ tiel indigniga, ke la Regna Konsilejo ankaŭ, kiel la Regna Dumo, malakceptas ĝin. Tamen la projekto moviĝas plue — al caro, kaj caro, kontraŭvole al la opinio de l' Regna Dumo kaj de la Regna Konsilejo, povas ĝin akcepti. Ĝi ne moviĝas al caro nur tiam, kiam du trionoj da voĉoj de la Regna Dumo kaj de la Regna Konsilejo starigis kontraŭ la ministra leĝoprojekto. Sed, se en Dumo ne nur plimulto da du trionoj da voĉoj, sed eĉ se ĉiuj, unuvoĉe, starigis kontraŭ ministra leĝoprojekto, sed ke, en la Regna Konsilejo, nombro da voĉoj ne atingis du trionojn, la leĝoprojekto moviĝas plue — al caro, kaj caro povas ĝin konfirmi.

La regnaj Dumanoj, se dezirantaj kolektiĝis ĝis 30 personoj, povas ankaŭ proponi novan leĝon. Ni supozu, ke la Regna Dumo tiun ĉi leĝproponon akceptis.

Malgraŭ tio, laŭ la cara konstitucio, se ministro ne estas kun ĝi konsenta, ĝi plue ne moviĝas. Nur en la okazo, kiam la plimulto en la Regna Dumo atingis du trionojn da voĉoj, leĝoprojekto moviĝas plue — al la Regna Konsilejo. Post analizo en la regna Konsilejo, ĝi moviĝas al caro; se caro ne ĵetas ĝin en paperkorbon, li transdonas ĝin al la sama ministro, kiu ne konsentis kun la regna Dumo, por « ellabori »! La ministro penos ĝin « ellabori » tiamaniere ke, de l' antaŭa projekto ne restos eĉ postsignon, kaj tiam en tiu ĉi « plibonigita » formo, la leĝo enportigas ree en la Regnan Dumon.

Okulvideble, oni kunvokas la Regnan Dumon ne por ke ĝi povu ion decidi, sed simple por je ĝi mokadi. La leĝeldonado tre malmulte dependas de Dumo; sed la regnestro havas rimedon por tute sen Dumo eldonadi leĝojn. Se caro trovas, ke ian leĝproponon faritan de ministro la Regnaj Dumanoj ekzamenas tro malrapide, tiam laŭ lia ordono, la Regna Konsilejo povas difini al Dumo tempon, en kies daŭro ĝi devas solvi tiun ĉi demandon de l' regna Konsilejo. Li povas ankaŭ difini limtempon, dum kiu tiu ĉi demando ne povas esti serioze preparolota. Tiamaniere leĝoprojekto, ne decidita de Dumo, rekte transiras en la Regnan Konsilejon.

Tiel staras l' afero de l' leĝeldonada potenco de l' Regna Dumo! »

D^o M. (Rusujo.)

Bonfaremo. Laŭtempaj observajoj de Berta von Süttner (Vieno).

Tradukite kun l' afabla permeso de la aŭtorino, de D^{ro} J. HANAUER, el Frankfurt' a/Main'.

Tuj post la disdono de l' Nobel'aj premioj, ni enpresis, inter tiuj de ĉiuj gepremiitoj, la portreton de B^{ino} von Süttner. Ni povas doni hodiaŭ, dank' al la afableco de la aŭtorino, kaj tiu de nia klera samideano, D^{ro} J. Hanauer, pensojn fortikajn kaj rimarkinde pravajn de la fama pacifistino pri la organizacio de l' pacifismo kaj la celo de ĝi trafota.

Ni tre atentigas pri ili tiujn el niaj samideanoj, kiuj envidiĝis en la pacifistaro.
« T. I. M. »

Barono Nathanielo Rothschild postlasis 20 milionojn da kronoj por la konstruado de rifuĝejoj por nervmalsanuloj, — reĝe grandanima kaj home nobela donaco! La « Nova Libera Preso » skribis en sia felietono, parolante pri tio ĉi kaj aliaj filantropaj agoj de l' mortinto:

«Estus kompreneble pli bone, se ni restadus en la mondo ekzistanta sen bonfaremo kaj tiu ĉi celo estas penadinda kaj atingebla. For de la utopioj kaj ŝtatoromanoj, la neniiĝo de la malriĉeco sendube apartenas al la eblaĵoj; nuntempe oni ne povas lasi flanken la bonfaradon, uzante ĝin kiel armilon en tiu ĉi batalo, kaj precipe la grandstilan bonfaradon de amerikaj multmilionuloj, kaj la ĵus faritan de ano de tiu ĉi urbo».

Kiel okazas nun, mi demandas, ke por la plej granda, la propra celo de sociala progreso kaj filantropa pensmaniero, — nome la malebligo de la suferado — la fontoj de la bonfarado fluas tiom pli malsufiĉe, preskaŭ tute ne oni povus diri, ol por la plidolĉigo. Monsumoj, kiuj malhelpas la mizeron de — supoze — 100 proksimuloj, sufiĉas antaŭgardi centmilojn (tiel nekonatajn kaj malproksimajn al la donacinto) de l' mizero. La minacanta militmizero eĉ trafas ne nur proksimularantojn; sed la infanoj kaj la nepoj de l' donacinto estas elmetataj al ĝi. Cent moneroj, elspezataj por la sekigo de marĉo, certe havas multe pli utilan efikon, ol la sama sumo elspezata por aĉeti ĥinan ŝeloplavoron (1) kontraŭ la marĉefbraj malsanoj.

Aŭ alia komparo. La mono elspezata por la plidolĉigo de ekzistanta malbono rilatas al la mono uzata por la malhelpo tiel, kiel la disdono de ia kvanto da greno al malsatuloj, je la dissemo de la

sama kvanto en la malsatema teritorio. Tiu ĉi dissemo tute malebligas la mizeron post la plej proksima rikolto. La amerikaj multmilionuloj antaŭvidadas — jela sociala ŝaktabulo — kelkajn trajtojn. Ili fondas bibliotekojn, universitatojn, por plialtigi la nivelon de la popola klero; aŭ ili konstruas — kiel faras Andrew Carnegie — palacon por la Haaga arbitracia kortego, por ke tiu ĉi instituto ekzistu pli frape videblege, pli brile, kaj alvenu des pli frue al la evolucio de sia agado celanta malhelpi la militon — t. e. la kaŭzo de la plej grandega homomizero.

Nun mi alvenis en la kernon de mia temo. Kaŭze de la grandaj bonfardonacoj de l' lasta tempo, la demando estas trudiĝinta al ni, organizitaj pacanoj: kial ne venas al unu sola bonfaremulo de l' homaro — esceptinte sole Alfredon Nobelon

— la ideo, adresi siajn donacojn al tiaj institucioj, celantaj helpi efektiviĝi la plej grandan el ĉiuj penseblaj bonfaroj, kaj liberigi la mondon de tia batego, certe sekvata de ĉia mizero — epidemioj, malriĉiĝo, detruadoj kaj malespero.

La respondo estas certe tre simpla. Ankoraŭ mankas la kredo, ĉar mankas la komprenemo. Oni ne kredas, ke la pacema movado kondukos al la celo, kaj tial oni ne helpas ĝin. Mi silentas pri tiuj,



Kl. « Annales ».

BARONINO BERTA VON SÜTTNER.

(1) Fr: Quinine: Kinino.

kiuj ne volas komprometiĝi per tia helpo, tial ke ili ne volas malkontentigi potencajn militamajn rondojn, aŭ ke ili havas personan kaj tujan intereson je la batalilfabrikado, armeliveradoj kaj militaj pruntoj. Mi pensas pri la liberanimoj kaj la malegostoj, starantaj malproksime de la pacema movado nur tial, ke ili scias pri ĝi preskaŭ nenion aŭ nur falsaĵojn, kaj kiuj kvankam tute simpatiaj kun ĝi kaj kontesantaj ĝian celon kiel dezirindega, tamen rifuzas ĉian materian helpon, opiniante, ke tia « ideala » aĵo ne povus esti helpata per materiaj rimedoj.

Pri tio mi volus nun diri ĉi poste kelkajn klarigajn vortojn, kaj petas por mi la tutan atenton necesan en tiel grava afero.

Certe per la monsumoj donacitaj al la pachelpaj institutoj kaj societoj ne povas esti kreata la internacia rajtostato, formanta la supozajon de senmilita epoko kaj sekvota de pli grava malmultigado de armaj impostoj; sed la kreadon kaj la plifortigon de la publika opinio povas fari la institutoj kaj societoj per sia agadeblo, kaj ĉi tion ofte ili jam efektive faris.

Pri tio, ke tiu ĉi influado ne estas jam komuna kaj grava, estas kulpa nur la nesufiĉeco de la disponeblaj rimedoj. Eĉ la ŝiparaj unuiĝoj ne povas senpere trafi sian celon. Neniaj unuiĝoj, kolektante, ricevos sufiĉe da mondo por ke ili mem povu konstruigi la celatan nombron da kirasaj kaj krozaĵaj ŝipoj kaj torpedaj boatoj; ili nur povas eksciti la popolan aron, por ke la necesaj milionoj estu konsentataj de la popolrepresentantoj. Nur por tio, nur por ekscitado (pamfletoj, kunvenoj, gazetaj korespondadoj, migraj oratoroj k. t. p.) la ŝiparaj unuiĝoj bezonas monon; kaj por tio, ja, ili ĝin ricevas. Kaj ke tiuj, kiuj celas plimultiĝi — por kiajn aĵojn — ĉu ĉar ili aspiras je altaj favoroj, distingmarkoj aŭ komercaj interesoj, ĉu el sincera patriotismo — la maran armadon donacas monon al ĉiuj aroj, kiuj agadas por tio, plimultiĝo, tio estas nur natura kaj racia agitado. Kontraŭe ŝajnas al mi neprudente kaj nekomprenibile, ke la ĉiutage kreskanta amaso da homoj — inter kiuj estas ja ankaŭ milionuloj kaj filantropoj — aprobantaj kaj dezirantaj la celon de la paca agado, kontentiĝas per la platona certigo de sia simpatio, ne aldonante al ĝi la rimedon — « militan nervon » — kapablan ĝin alkonduki al ĝia plej rapida plenumo.

Nur la plirapidigo estas la afero; tiu ĉi kuŝas en la sola penado de l' prudentuloj. Venos ĉiuokaze la tempo de la leĝa ordo inter la popoloj; kaj estos iam repremadata la internacia nuna pugnoraĵo tute tiel certe, kiel estas repremita la pugnoraĵo inter la individuoj, la kasteloj, la urboj, la provincoj: tio estas la nedetenebla iro de la civilizacio; sed tiel staras la demando: kiam tio ĉi okazos? Ĉu nur niaj malfruaj posteuloj aŭ jam niaj infanoj aŭ eĉ ni mem travivos tian ŝanĝon? La demando ne estas malgrava, ĉar plidaŭra atendado en la malnova sistemo, por kio ĝiaj partianoj laboras, kun tiom da fervoro kaj tiel granda eispezado, signifas la naskiĝon de teruraj katastrofoj, la ripetadon en Eŭropo de orientasiaj grandegaj buĉadoj; katastrofoj, de kiuj nia generacio, kaj la plej proksime sekvonta, povas ankoraŭ esti atingataj, se la aĵoj de la nova ordo ĝustatempe ne finas sian organizadon, organizadon efektive jam formiĝantan kvankam sidantan ankoraŭ en ĝiaj unuaj — tre mankemaj — komencoj. Kiu ne estas blinda (sed

koncerne la fariĝontajoj la popolmasoj estas blindaj!) devas do vidi, sekve de la ĉiutage pli intime ligitaj internaciaj interesoj, komunan Eŭropan (eĉ plie kulturan), urĝantan al eksteraj formoj de l' agado kaj de l' firmiĝado. Kiu ne estas blinda, aŭ diru ni, kiu tien rigardas — multe da homoj havas ja bonajn okulojn, sed ili direktas ilin obstine al la delongatempe ekzistantajo, kiu do tien rigardas, tiu devas konsenti, ke la plej granda kaj beninda ŝanĝo, kiun la historio konas, jam estas komencinta plenumiĝi. La paca movado ne plu estas tio, kio ĝi ankoraŭ estis antaŭ dek jaroj, nura teorio, nura ĉeno el demandoj, profetaĵoj kaj postulaĵoj; ĝi estas preninta jam formon: arbitraciaj kontraktoj, kvankam ankoraŭ timeme provizitaj de kondiĉoj, estas subskribitaj; internacia tribunalo estas kreita kaj jam funkciinta; interparlamenta unuiĝo estas disvastiĝinta tra ĉiuj landoj, kaj dua paca konferenco estas kunvokita de prezidanto Roosevelt: mallonge — la pacifismo ekmarŝadis. Kaj ekster ĉi tiuj kapteblaj formoj, io venis en la mondon, kio montras la spiriton de la nova direkto: antipatio kreskanta kontraŭ militaj solvoj de la ekaperantaj malkonsentoj: oni pensu pri la Hull'a afero, pri la skandinava « unuiĝa malpaco », pri la francagermana Maroka konflikto. Nian dankecon meritas la jam progresinta paca opinio pro tio, ke la militaj partioj ĉiutage ne povis uzi ĉi tiujn okazojn por la atingado de siaj celoj; — ĉiuj tiuj evititaj militoj estas metindaj en la aktivkalkulon de la pacifismo. Sed kiuj kalkulas la bonan helpon faritan tiel al ni ĉiuj?

Tamen oni ne kredu, ke la pacemuloj, kies vidforto estas akra por tiaj aperaĵoj, estas eble blindaj rilate al la agado de la malnova sistemo, kiu sin montris sur la manjuraj batalkampoj tiel timiganta kaj maturiganta ĉie novajn armojn lande kaj mare; sed ĉar ambaŭ principoj nun samtempe plenigas la mondon, estas grave helpi la kreskadon de io nova. La supre cititaj okazoj, disiginte nin nur per hara dikeco de teruraĵoj de eŭropa mondobruĵado, montris des pli klare sur kia ŝanceliĝa fundo ni staras; kiel proksima estas la danĝero, ke dum estonta okazo la militkurĉasistoj gajnu la venkon; kiel necese do estas organizi la internacian justecan staton. Tie nur povos esti atingata per antaŭa fortigo de l' publikaj volo kaj konscienco — unuvorte per la propagando.

La Amerikanoj, kies idealismo estas praktika, kiuj scias ke por efika propagando estas necesa multe da mono, kaj kiuj havas tiun monon — la Amerikanoj ankaŭ montris en tiu afero, la sukcesigan metodon. Dum la pacifista kongreso en Boston (1904^a) estis farata propono, ke provizore sumo — modeste nur tiel granda, kiel la kosto de unu sola kirasŝipo — devas esti kolektata por ebligi al la pacaj institucioj sukcesplenan kaj indan reprezentadon: inter aliaj, en ĉiu ĉefurbo fondi propran domegon kun kunvenaj, legaj kaj paroladaj ĉambregoj, kun bone pagataj oficistoj, migraj parolistoj, publikigaj organoj k. t. p. Konforme je tiu ĉi decido de la centra pacuniĝa oficejo estis fondata en Berno « internacia propaganda kaso ». Tiu ĉi staras sub la protekto de la berna kantona registaro kaj sub la estrara kontrolo.

Tien fluu la monoferoj kaj donacoj de tiuj, kiuj sentas sin kiel homamikoj.

Al la pensemuloj — al tiuj kiuj pensas pri la estonteco — estas dediĉitaj tiuj linioj.

B. VON SUTTNER,
el Vieno (Aŭstrujo).



La sana stato dum la Rusa-Japana Milito

De Doktoro P. GAMBIER (Francujo).

La kondiĉoj de la moderna milito tiel multe ŝanĝiĝis pro la rapida kaj malproksima pafado, ke ĉio estas aliformigota por la milita medicino.

La facilmovaj malsanulejoj difinitaj por akompani la antaŭgvardiojn, ne povis esti uzataj pro la pafado; same estis por la unuaj vicoj de la batalant-oj. Ja, estas nun tute neeble kuraci, bandaĝi, eĉ kolekti la vunditojn; kaj oni estas devigata lasi ilin, kie ili falis.

El tiuj vunditoj, unuj mortas tuj, pro la graveco de la vundoj; aliaj povas moviĝi, aliaj ne povas moviĝi, kaj restas sur la militkampoj. Tiuj lastaj estis multe nombraj; dum la vintro preskaŭ ĉiuj estis frostigitaj.

En Liao-Yang, estis multe da malsanulejoj kaj hospitaloj tre taŭge aranĝitaj. Oni estis devigata ilin forlasi dum la fama kaj ordonita foriro de Kuropatkin'.

La hospitaloj estis translokataj en Mukden'on, en ĥinajn domojn, kaj en specialajn konstruaĵojn, kies kelkaj estis duone subteraj. Tiuj lastaj, sub la militista regado, ne estis ĉiuj bone aranĝitaj; tial ke la medicinistoj tro dependis de la militistestroj.

Dum ses monatoj la sana stato de la armeo estis bona; dum la somero, estis multaj disenterioj ne tro gravaj, multe ankaŭ da sunfrapoj. Sed estas rimarkinde ke la ĥolero neniam mortigis tiun jaron en Manĵurio.

Doktoro Follenfant, ĉefmedicinisto de la franca armeo, kiu partoprenis en la militista misio en Manĵurio, certigas ken eniam oni konstatis tiel malmulte da malsanoj dum tiu milito, kaj ke tio rezultis de la bona nutraĵo por la militistoj, kaj de la boneco de la klimato en Manĵurio.

La sperto montris, ke la grandaj hospitaloj ĉe specialaj lokoj estis tute senutilaj; ili tre multe kostis kaj senmoviĝis grandan parton de la medicinistoj kaj de liaj helpantoj; ĉar post ĉiu batalo estis 50,000 — 100,000, vunditoj kuracotaj samtempe. La hospitaloj de Kharbin'o estis tute nesufiĉaj post la batalado de Mukden'o: *Vunditoj estis devigataj atendi eĉ dek tagojn, por ke oni povu zorgi pri ili.* Estus estinte necese ke ĉiuj Siberiaj hospitaloj estu tien alcentrigitaj.

Do la antaŭgvardiaj malsanulejoj, kaj la malproksimaj hospitaloj estis senutilaj.

Pri la medicinistoj, krom ilia severa dependeco, multe da ili plendis ke oni ne atentis pri iliaj specialaj kapabloj. Tial, oni vidis februlojn kuracataj de hirurgiistoj, kaj vunditojn amputatajn de medicinistoj, kiuj neniam estis operaciintaj.

La filtrado de la morto kredeble tiel okazis: Post batalo, la plej grave vunditaj diskuŝas tere; neebleco tuja ilin kolekti pro la pluvegado de la kugloj; ili mortas frostigitaj, se estas malvarme, aŭ la Rusoj estas devigataj rapide forlasi la batalkampojn. Cetere

la nombro de la vunditoj estas tiel granda, ke nur tre malgranda parto povas esti transportata; do en la malsanulejoj alvenas nur la malplej gravaj vunditoj, kiaj povis rampi kelkajn kilometrojn. Tie, restado en la hospitalo, kaj ebla morto por la plej malsanaj; rapida forlokigo de la malplej grave vunditaj. Se pligraviĝo okazos veturante, morto aŭ halto en unu el la Siberiaj hospitaloj. Se ĉio favore okazos, nia vundito alvenos Peterburgon aŭ Moskov'on; li ne plu estas vundito nek malsanulo; li estas kriplu'o aŭ anemiulo.

Kiuj estas la militistoj kiuj batalis? La rezervaj militistoj: la plej granda parto el la aktiva armeo restis en Ruslando por gardi la Imperion, la Tronon, kaj la Kapitalon. Post unu monato de diversaj ekzercedoj oni alsendis ilin al Manĵurio. — Ses longaj semajnoj estis necesaj por aliri ĝis Kharbin'o; kaj en kiaj vagonaroj! Laŭ la unuj, la soldatoj mortis pro malsato kaj eljetis terurajn kriojn; laŭ la aliaj, ili ricevis fortan nutraĵon. Eble ĉiuj estas pravaj, ĉar de la ĉefo de ĉiu milita vagonaro dependis la nutraĵoj por la homoj!... Certe la veturado estis peniga, ĉar la soldatoj estis devigataj ripozi kelkajn tagojn, antaŭ ol aliri Mukden'on por batali.

La militistoj, kiuj partoprenis en la unua parto de la milito ĉiuj ripozas: en la komuna tombo, en ilia familio aŭ en Japanlando.

Ĉe la monato Septembro: batalo de Ŝa-Ho; pli ol 40,000 vunditoj, kaj jam alvenas la kruela vintro. Ĉar la hospitaloj ne plu estas sufiĉaj, la forkonduko de la malsanuloj okazas en tre malbonaj higienaj kondiĉoj. Mi ne parolos pri tiuj inferoj veturantaj tra la senfinaj stepoj...

Kie vivis la soldatoj dum la vintro? en subteraj kazematoj aŭ prefere nestoj tegitaj de gao-ljan'. Oni diras ke ili estis sufiĉe nutrataj, sed estis neeble lavi la vestojn: la riveroj estis glaciigitaj, kaj la homoj estis kovritaj de pedikoj, kelkajfoje ili skuis sian ĉemizon super la fajron por bruligi kelkajn... La oficiroj pasigis la vintron en ĥinaj domoj (Fanza) tre malbone konstruitaj.

Multaj soldatoj restadis en nefermitaj fosajoj, starante en la malsekaĵo dum longaj tagoj; tiuj ĉi estis atakataj de speciala malsano kaŭzita de la malsekeco kaj de la vertikala starado ĝis la senfortiĝo. Iaj militistoj pasigis tiel semajnojn!

Sed la maso de la armeo kontraŭbatalis sufiĉe la malsanon, kaj, dum la vintro, la mortado ne estis tre granda. La skorbuto divastiĝis proporcie tre malmulte, krom en Port-Artur'o.

*Eltirita el « Le Bulletin médical de Québec. »
el artikolo de D^o MARCOUX.
Esperantigis, D^o P. GAMBIER.*



GRENOBLE KAJ LA SUPRARO DE BELLEDONNE.

Dauphiné.

Priskribo de H. SENTIS, el Grenoble.

Le Dauphiné kaj La Savoie estas du el la plej belaj provincoj de Francujo. Tamen iliaj vidaĵoj, jen sovaĝaj, jen ĉarmaj, restis longatempe nekonataj pro la malfacileco de l' travojaĝo kaj la senkomforteco de l' hoteloj, kie la kuirarto kaj la pureco estis en malgranda estimo. Sed tia stato tute ŝanĝiĝis. Fervojoj trapenetras la valojn Tarentaise, Maurienne, Oisans, Durance, kaj komfortaj veturiloj (karoj); regule supreniras multajn montojn. Samtempe, dank' al la klopodoj de l' franca Touring-Club kaj de la lokaj Iniciativaj sindikatoj, la hoteloj pliboniĝis, kaj novaj konstruiĝis, eĉ sur la plej altaj lokoj. Nune niaj montoj estas pli kaj pli vizitataj de l' turistoj, kaj somere loĝataj de personoj, kiuj intencas ripozi, dum unu monato, de la penoj kaj pensoj de l' kutima vivo.


Mi prezentas al vi, kara leganto, kelkajn fotografaĵojn de l' Dauphiné. Unue jen la ĉefurbo Grenoble trairata de l' rivero

Isère. Ĝi estas urbo je 70000 loĝantoj, kies vidiĝo estas gaja kaj pura, pro la cementa bedo, kiu kovras multajn stratojn, kaj pro la kristala akvo, kiu ŝprucas en pelvoj de la publikaj ĝardenoj. Tie estas Universitato, kies kursoj estas sekvataj de nombro, ĉiam pli kreskanta, de fremdaj studentoj, kiuj lernas la francajn lingvon kaj literaturon. La vojaĝantoj devas viziti precipe la juĝejon kaj la muzeon. Iu ankaŭ ne devas forgesi la belan kastelon de l' Duko Lesdiguières en Vizille (je 17 kilometroj de Grenoble).

Sed Grenoble estas ĉefe ŝatata de l' turistoj pro sia bela najbaraĵo. Ĝi kuŝas ĉe la fino de longa kaj riĉa ebena Grésivaudan, tra kiu Isère serpentiras, kaj kiu etendiĝas, kiel grandega verda aleo, laŭ 60^k inter Montmélian kaj Grenoble. Tiu aleo estas bordata, ĉe ĉiu flanko, de regula monta ĉeno. Dekstre de ĉi, kiu venas de Montmélian, estas la montaro de l' Grande Chartreuse, kaj maldekstre, la Dauphiné aj



LA TRI PINTOJ DE BELLEDONE KAJ LA BLANKA LAGO.



VOJO DE « LES GRANDS GOULETS ».

Club Alpin konstruigis tie, ĝe 2145^m, alloga hoteleton, La Pra, kiu eĉ posedas telefonon.

La alia ĉeno estas malpli alta, ĉar ĝiaj pintoj ne ofte superas 2000^m. Ĝi estas kalkoŝtona, kaj prezentas alian vidigon ol tiu de la kontraŭaj Alpoj. En ĝi, plej ofte, la krutaĵoj estas vertikalaj kaj glataj kiel supraĵo de muro. Tiel de Montmélan ĝis Grenoble, la ĉeno estas supre bordata de regula remparo, tra kiu nur maloftaj fendoj permesas grimpadon. Fotografajo montras unu el tiuj fendoj apud la Dent de Crolles, pinto kiu efektive similas grandegan vangan denton.

Meze de tiu montaro, estas la fama monaĥejo Grande Chartreuse. Nune la monaĥoj estas elpelitaj, kaj, almenaŭ je turista vidpunkto, tio estas bedaŭrinda. Eĉ la skeptikuloj opiniis kurioza la aperon, dum la nokta meso, en malhela kapelo, de la monaĥoj, ordigitaj laŭ la muroj, kaj mezavoĉe kantantaj preĝojn, kiujn ili legis per helpo de malgranda lanterno. Cetere, la mirinda loko, en kiu situacias la monaĥejo estas la vera kaŭzo de ĝia famo; kaj la ĝenerala konsento pri ĝia beleco igas senutila insisti pri ĝi. Oni povas viziti la monaĥejon, de Grenoble, en unu tago. Plej ofte oni iras ĝis St Laurent du Pont per tramo, kiu trapasas la rimarkindan pasejon le Crossey. Poste, karo kondukas vojaĝantojn per la vojo de l' Dezerto, kies komencon oni vidas en fotografajo.



« GRANDE CHARTREUSE » : ĜENERALA VIDO.

Alpoj, nomataj ankaŭ ĉeno de Belle-donne, per la nomo de ĝia ĉefa pinto. La montoj kovritaj, je la mezo, de densaj abiaj arbaroj, levas siajn fierajn kulmenajn suprojn ĝis preskaŭ 3000 metroj. Tamen estas nune tre facile promeni tra iliaj krutaĵoj, kaj sidigi revante apud la trankvilaj lagoj kaŝitaj de la ĉirkaŭanta rokaro. Efektive la franca

Por la reiraĵo oni havas alian karon kiu supreniras la montolon de l' Pordo (1352^m) per vojo serpentanta tra ĉarmaj herbejoj kie abioj grupiĝas en aroj pli kaj pli grandaj, ĝis ili formas densan arbaron. La turistoj, kiuj povas pasigi unu tagon en la hotelo apud la monaĥejo, uzas tiun tempon por surgrimpi la Grand Som (2093^m). Tiu ascendo

(suprenrampado), ne malfacila, permesas ĝui beleegan vidon ĉe la kulmeno (supro).

Alia ekskurso farinda estas la vizito de l' sovaĝaj valetoj de la Bourne kaj de La Vernaison, en montaro Vercors. La gorĝo de La Bourne, kie la vojo estas ofte skulptita en la roko, je granda alteco super la furioza torento, estas, laŭ sia tuta longo, vera mirindaĵo; kaj tiu de La Vernaison prezentas la pasejon des Grands Goulets, kies strangan aspekton (vidigon) montras nia fotografajo.

Autaŭ ol forlasi Grenoble, la vojaĝanto havas ankoraŭ trian ekskurson por fari, tio estas iri ĝis La Mure per fervojo, kiu superas rekte abismojn, kies fundon okupas la granda torento Le Drac.

Nun, kara leganto, ni memoru ke la ĉeno Belle-donne estas komenco de Alpoj, kiuj etendiĝas sur proksimume 150 kilometroj ĝis la italiaj ebenoj. Sur tiu granda spaco, kuŝas vera haoso de montoj, tra kiuj serpentiras mallarĝaj valetoj. Sekve ni ne

povas forlasi le Dauphiné, ne farinte almenaŭ unu ekskurson tra tiu sovaĝa lando. Ĝi postulas du tagojn. La rapidantaj turistoj prenu la tramon, kiu kondukas al Bourg d'Oisans, tra valo permesita inter du grandegaj montaj muroj. En tiu urbeto, kiu kuŝas en ebena, iam fundo de lago, ili trovas karon aŭ aŭtomobilon kiu daŭrigos la supreniron al la fino de l' valo. Tagmanĝante en la urbeto La Grave, ili havas la vidon de l'




LA DENTO DE CROLLES.

belega glaciejo La Mejje, bone konata de la grimpujoj. Poste ili alvenos al kolo Lautaret, kie estas nune bona hotelo ĉe 2050 metroj. Nia fotografajo donas ideon pri la sovaĝeco de la lando. Tamen ni devas aldoni ke en la Junia monato, kiam apenaŭ la neĝo malaperis, la herbejoj sin kovras de nekredbla amaso da floroj, kaj tiu loko estas fama inter la ĉiulandaj botanikistoj, pro la diversaj Alpaj kreskaĵoj, kiuj troviĝas nur tie.

La karo daŭrigas sian kuradon, malsuprenirante la alian flankon de l' kolo, ĝis la urbo Briançon, kiu fiere vidiĝas en sia zono de fortikaĵoj. Ĝi estas ĉirkaŭita de montoj kovritaj de larikaj arbaroj, en kiuj estas ĉarmaj celoj de promonadoj. Tie oni povas, per fervojo, iri al Marseille aŭ reveni al Grenoble, kaj alie, preni karon kiu, tra la kolo Mont Genève (1950^m), iam uzita, oni diras, de Hanibalo, kondukas al la itala stacidomo Oulx, post la tunelo de M^t Frejus, ofte nomata erare tunelo de M^t Cenis.

Sed la turistoj, kiuj deziras veturi kiel eble plej alte, prenu, en Lautaret, alian karon, kiu supreniras ĝis la kolo Galibier ĉe 2658^m. Ĝi estas la plej alta vojo en Eŭropo, post tiu de l' Stelvio. Ĝi kondukas al la stacidomo St. Michel, en Savoie, kie oni povas laŭvole iri Italujon au veni reen, kunportante provizon da agrablaj memoraĵoj.



VOJO AL «LA GRANDE CHARTREUSE»: LA «DEZERTO».

La turistoj, kiuj deziras pli da detaloj, skribu al Iniciativa Sindikato en Grenoble, aldonante poŝtmarkon por la respondo. H. SENTIS.

Esperantaj Signoj.

Grupo de Reichenberg (Bohemujo) (ĉe S^o A. H. Rudolf, Römhelegasse 20): verda stelo emajlita kaj polurita kun la vorto Esperanto kaj ora steleto: 0,80 heleroj.

Grupo de Neuchatel (Svisujo): steleto reliefa, verde emajlita, vendata je l' profito de la Svisa propagando.

(1 fr. afr. — ĉe S^{ro} H. Stroele, Orangerie 4, Neuchatel).

En okazoj kiam oni opinios ne taŭgaj tiujn signojn kaj la jam ekzistantajn, oni povos uzi utile la pingleton ĵus eldonitan de la Frankfurta grupo, kun sfera kapeto verda, kiun oni fiksus ĉe la angulon de la dekstra vestkolumo. Tiuj pingloj, kiuj similas al tiuj fantanziaĵoj uzataj de virinoj por ilia tualetto, kostas 20 pfenigoj po 50; 35 pf. po 100; sendkostoj 10 pf. (Sendi monon al S^o C. Barthel, Woehlerstr., 14, Frankfurt a/M. Allemagne).



LE LAUTARET KAJ GLACIEJO DE L' HOMO.

Ĉirkaŭ la Kongreso.

Kio mankis dum la
Bulonja kongreso.

Nun ellaboriĝas la programo de l' kongresaj festoj.

Estas dezirinde, ke oni aŭdu infanojn recitantajn, kiel dum la Kalesa'j festoj, en l' 04. Mi ĉiam memoros, mi kredas, la tri filinetojn de Sinjorino Bergier, la sindona vic-prezidantino de l' Bulonja grupo, recitantajn la konatan fabelon de La Fontaine, « La ŝafo kaj la lupo » Precipe en Dovero, en la solena ĉambrego de l'Urbadomo, nenio estis pli ĉarma ol vidi kaj aŭdi ilin metitajn sur grandan tablon; nome: la mezaĝa diranta la rakonton, dum la plej juna ludis la rolon de l' kompatinda ŝafido kaj la plej aĝa, tiun de l' senkompata lupo. Mi imagas ke D^{ro} Zamenhof estus sentinta grandan plezuron je tio spektaklo, kaj mi petas la organizantojn doni al li, tiun ĉi jaron, la kontentiĝon aŭdi sian lingvon elparolatan de belsonaj infanaj voĉoj.

El letero de **Pastro Schneberger**, prez. de l' « S. E. S. »: « La Esperanta kaj kongresa propaganda nun tre rapide marŝas en Svisujo: mi esperas ke vi trovos



RECITANTE « LA ŜAFO KAJ LA LUPO » N.

dum la kongreso tute Esperantiĝin tan landon kaj urbon.»

Pri tio ni estas certa La fervoro de niaj svisaj samideanoj estas konata, kaj ankaŭ ilia lerta propaganda maniero, kies pruvon oni povos legi en nia kroniko.

Somerrastadoj.

S^{ro} D^{ro} A. Boubier, prezidanto de la Esperantista grupo Ĝeneva pasigos grandan parton de la monatoj Julio kaj Aŭgusto en Juffly apud Bonne-sur-Menoge, (Hte Savoie) Francujo, Pension Donche-Gay Li estas tre feliĉa renkonti tie samideanojn.

Hotelo rekomendata: Chalet Speranza, (Frutigen Berne) alta je 850 m, komforta domo, bonega nutraĵo, belega vidaĵo al la Alpoj Centro de ekskursoj. Moderaj prezoj. Oni parolas kaj korespondas Esperante. « Tra la Mondo » legebla.

(Anoncoj senpagaj por niaj abonintoj.)

Kroniko.

La grupo de Ŝumen' (Bulgarujo) organizas ekspozicion por kiu ĝi petas, kiel eble plej frue, dokumentojn. Denove ni instigas la fervortulojn sendi ĉiuspecajn dokumentojn, kies konvinkanta forto valoras pli ol ĉiuj paroloj kaj artikoloj. Sin turni al: Grupo Esperantista « Vekiĝo », en Choumen (Bulgarie).

Esperanto ĉe la Komercistoj.

Precipe komercajn dokumentojn oni devas sendi, pro la grava movado pli kaj pli kreskanta en la komerca mondo.

Ni jam parolis pri la fondo de « Internacia komercista Esperanta Societo », kies nomo montras sufiĉe la celon.

Jen, nun, alia ne malpli grava sciigo.

La komercistoj esperantistaj de Parizo kaj ankaŭ la oficistoj kunvenis en la ĉambrojn de la Esperantista Centra Oficejo. Oni difinis tiele la celon de la estonta grupo: la pligrandiĝo de la internaciaj komercaj rilatoj per Esperanto.

La ĉeestantoj nomis komisiitaron por esplori kaj raportari pri diversaj proponoj kaj projektoj tre interesaj. En kunveno, kiu okazis la 11^{an} de Junio, oni longe preparolis la aferon, sed ne povis decidi ĉu oni formos sekcion komercan de la Grupo pariza, aŭ ĉu oni faros memstaran komercan grupon.

Nova kunveno, al kiu oni kunvokos ĉiujn komercistojn esperantistajn, okazos la 18^{an} de Junio.

El la projektoj esploritaj ni povas citi tiun de la Societo « Progreso » en Frankfurt-a-M, kiu estas tre zorge ellaborita, tiun de S^{ro} Cazeaux, el Bordeaux, kaj tiun de la Grupo de Amiens.

La disdono de l' premioj de l' « Politeknika Asocio » okazis la 17^{an} de Junio, sub la prezidanteco de S^{ro} A. Briand, ministro de l' publika instruado.

Nia kara lingvo ne estis forgesita, kaj la premioj disdonitaj favore altiris la atenton de l' ministro,

Fondo de « Germanlingva Esperantista Societo ».

La 20 an de majo fondiĝis en Brunsvigo la G. E. S. enhavonta ĉiujn Esperantistojn, kies gepatra lingvo estas la germana. Ekster la multenombraj anoj de la brunsviga grupo, kiu aranĝis la kongreson, tiel sukcesplene kiel ofereme, ĉeestis reprezentantoj de la grupoj:

Berlin, Braunschweig, Breslau, Brünn, Elbing, Frankfurt a/M, Frankfurta laborista grupo, Göppingen, Halle a/S, Hamburg, Hanau, Neu-Isenburg, Prag, Schöneberg, Stuttgart, Ulm, Ung Hadisch, Wien, Wiesbaden, kaj fondis unuigon registrotan (E. V.) nomatan « Germanlingva Esperantista Societo » G. E. S.)

La ĉefa tasko de la Societo estas la *divstigado de Esperanto tra la scienco kaj tra la komerco*, precipe en la germanlingvaj landoj: Germanujo, Aŭstrujo, ankaŭ Svisujo.

Ni instigas ĉiujn germanlingvanojn aliĝi al tiu societo, kies fondo, tiel dezirita estas unu el niaj plej gravaj progresoj.

La nomo de l' estraro sufiĉas por montri la aktivecon montratan:

Honora prezidanto: D^{ro} L. Zamenhof.

1^a prezidanto: D^{ro} E. Mybs, Altona, Marktstr. 68.

2^a prezidanto kaj sekretario: D^o J. Hanauer, Frankfurt a/M, Bleichstr. 5.

Kasisto: Fr. Schuck, Braunschweig, Thomaestr. 16, la aŭtoro de l' albumo de konataj Esperantistoj.

La jarkotizaĵo estis fiksata je 3 markoj, entenate la senkosta livero de l' oficiala organo « Germana Esperantisto. »

Tiu elekto estas tute justa pro la bonegeco de tiu propagandilo, kies redaktoro, nia distinginda kunfrato J. Borel, tiel bataladis por fondo de « G. E. S. »

Kiel ni estis ĝin anoncita, ni intencis eldoni marŝadon de S^o Proharzaka, je l' honoro de Doktoro Zamenhof. Sed nia presisto ne estas sufiĉe provizita de muzikaj presiloj por povi ĝin enpresi. Atendante ke tiu malagrabla cirkonstanco ĉesu, oni bonvolu ne plu sendi al ni muzikon.

La intereso kaŭzita de nia lasta numero estis tiel granda ke la disponeblaj kajoroj, ekter tiuj rezervataj por la abonoj, estas preskaŭ tute elĉerpitaj ĉar, bedaŭrinde, kiel ni ĝin diris, ni estis devigitaj malpligrandi la presadon. La restantaj apartaj numeroj estas vendotaj 1,50 fr.

Por eviti tian bedaŭrindaĵon, ni de nun sciigas ke niaj Aŭgusta, Septembra kaj Oktobra numeroj estas parte dediĉotaj al la Geneva kongreso. Do tiuj kiuj dezirus kelkajn kajorojn de ĉiu el ili por disdoni propagande, aŭ la personoj kiuj bonvolus instigi samgrupanojn aŭ gekorespondantojn havigi la kongresajn numerojn, estas petataj bonvoli tuj fari sian mendon aŭ komenci sian agadon.

Tio estos aparte necesa por la grupoj.

STELETO.

Svisa esperanta Societo.

En la kunsido de l' 16^a de Aprilo, pri kiu ni raportis en nia lasta kunveno, estis alprenata grava decido: kiel en Germanujo, la propagando estas fakiĝita: nun okupiĝas pri ĝi:

ĉe la estraro kaj oficistaro svisaj, la grupo de Bern;

ĉe la profesorado, studentaro kaj gazetaro, la grupo de Zürich;

ĉe la komercistaro, hoteĵistaro, k. t. p., la grupo de Basel;

ĉe la fervojaj kaj poŝtaj oficistoj, la grupo de Solothurn;

ĉe la laboristoj kaj iliaj organizoj, la grupo de Winterthur;

ĉe la instruistaro kaj infanaro, la grupo de Loole et Brenets; pri propagandiloj kaj ilia disdono al la grupoj svisaj, la grupo de Neuchatel.

Fine, ĉiuj sciigoj de l' svisaj grupoj estas kolektataj kaj finredaktataj de D^{ro} Renard, Genève, redaktoro de « Svisa E-pero » l' oficiala organo de « S. E. S. ».

S^o L. E. Meier, el München, donacis la plenan tradukon de la Schiller' a dramo « Wilhelm Tell » al « S. E. S. » por sia propagando. Kotizaĵoj repageblaj por la eldono (po 25 fr.)

estas danke akceptataj de la prezto de la Basel' a grupo (S^{ro} F. Wenk, 7, St Albanalage, Basel).

El letero de Pastro SCHNEEBERGER.

S^o R. Fred Geyer (*Porto Alegre, Brazilujo*) esperigas baldaŭan fondon de grupo en tiu ĉi urbo; interesiĝas pri Esperanto la studentoj kaj profesoroj de la medicina lernejo. En *Rio Grande do Sul, Esperanto eniris per Almanako Hachette*. Multe klopodas por nia afero D^o Olinto de Oliviera, S^{oj} Caetano Coutinha kaj Christiano Kreamer.

Kun iom da miro mi legis « en Espero Pacifista » ke Baronino Bertha von Suttner ne estas favora por Esperanto. Sendube tiu avizo estis donata laŭ malnovaj sciigoj ĉar la 2^{an} de Januaro 1906, nia sindona samideano Otto Simon, el Ung Hradisch bonvolis sendi al mi memskribaĵon de la fama pacifistino kun la jena traduko:

Vieno, Zedlithgasse 7, 21/II/05.

Tre estimata sinjoro profesoro,

« Multajn dankojn pri via broŝuro kaj la letero akompananta. Ke Esperanto formas gravan branĉon de la unuiga afero, tion ĉiuj pacifistoj konfesas. »

Plej koran saluton, via sindona.

B. Suttner.

Donante tradukon de atentinda artikolo de la inspirintino de Nobel, ŝajnis al mi juste memorigi pri la rolo ludita apud ŝi de P^o Otto Simon.

Finante tiun kronikon, estu permesate al ni danki korege la Esperantan gazetaron, kiu, krom tute maloftaj esceptoj, tiel favore kaj simpatie salutis la naskiĝon de « Tra la Mondo » kaj rimarkigis ĝiajn progresojn.

Niaj kolegoj estu konvinkitaj ke ni penados ĉiam meriti ilian konfidon kaj ilian estimon, kiu, kun la amikeco de nia legantaro, estas nia plej valora kuraĝigo.

A. MONTROSIER.

Bibliografio.

« Anatomia Vortaro » — « Urso — En Montoj », de H. Sentis. — « Mallumajoj », de Abonyi Arpad kaj de Lengyel Pal. — « La Serĉado por la ora ŝaflano », laŭ Nathaniel Hawthorne. — « Cindrulino », esp. de L. Milho. — « Dua libro de Plena Verkaro », de V. N. Devjatnin. — « La evangeljo sankta Mateo », esp. de S^{oj} Mielek kaj Stephan. — Propagandiloj. — Lernolibroj.

Kun ĝojo, mi ne timas uzi tiun vorton, mi trarigardis, per mia neklera okulo, la ĵus aperinta « Anatomia Vortaro », kiu havas netakseblan valoron por nia kaŭzo: Jam antaŭe pli ol unu jaro, mi skribis al D^{ro} P. Rodet, post la fonda de l' franca « Medicina esperantista grupo »: « Jam multaj famaj kuracistoj estas en niaj rangoj; kia grandega kaj potenca instigilo por la lernado de Esperanto de ĉiulandaj kuracistoj estus la eldono de medicina memoraĵo *originale verkita Esperante, kaj nur Esperante*, de unu el la princoj de la medicina scienco. La neesperantistoj devus, por ĝin legi, lerni Esperanton ». Kaj li respondis al mi: « Vi estas prava, sed mankas al ni la necesa terminaro. »

Nu, ĝi ne plu mankas, rilate la anatomion, kaj denove kaj publike, mi faras la saman alvokon al la medicina esp. eminentularo.

Juĝi la verkon, teknike, mi ne povas, sed laŭ la plano antaŭdesegnita kaj sekvita, laŭ ĝia klera kunlaborantaro, ĝi certe estas tia, kia oni povis ĝin deziri: ĉar, la planon, ĉiuj povas juĝi; kaj ĝi estas tute bonega kaj logika.

Konsiderante la grandnombrojn da esprimoj uzitaj por nomi la saman organon, kaj la preskaŭ neeblecon elekti la taŭgan; kaj la rimarkindan rezultaton atingitan de la Germanoj, kiuj sukcesis en la jaro 1895^a, ĉe la Basel'a kongreso, ellabori nomenklaturon en latina lingvo, kiu, de tiu tempo, estas uzata de ĉiuj germanidaj popoloj sub la nomo de « Basela nomenklatur », la « Medicina grupo » opinii, ke plejbone estas akcepti kaj uzi ĝin kiel fundamenton de la esperanta terminologio. Ĉar tiu ĉi latina nomenklatur estas akceptita de preskaŭ la duono de Eŭropo, la Latinidoj do ne renkontos ian ajn malhelpon por aligi al si la latinajn esprimojn de la Basela nomenklatur kaj sekve por paroli la saman anatomian lingvaĵon al la Germanidoj. Tiel, dank' al Esperanto, la anatomia lingvaĵo

estos tute internaciigita, kaj tiel estos la plej bona maniero evidigi la servojn fareblajn de internacia lingvo.

La tuta antaŭparolo estas komentariinda. Ni ĝin rekomendas, kiel la verkon, ne sole al ĉiuj kuracistoj, kiuj certe volos posedi tiun rimarkindan verkon, al la grupoj kiuj povos ĝin dispruntedoni al medicinaj varbotaj, al la aŭtoroj de teknikaj vortaroj, kiuj elĉerpos utilajn konsilojn por sia laboro, el la ekzameno de l' volumo, kiu, plue, estas klare ordigita kaj plaĉe prezentita.

A. MONTROSIER.

« Urso ». — Tiu ĉi rakonto de nia distinginda kunlaboranto estas vere plezuriga: ĝi kunigas la ĉarmon de l' elpenso al la lerteco de la lingvo, ĉar la aŭtoro, S^o H. Sentis, ĝin skribis originale en Esperanto.

Legante tiun verkon, mi memoris la delikatajn versojn kunigitajn en broŝureton, antaŭ du jaroj ĉirkaŭe, kiuj elmontris profundan amon al la monto.

Tiu amo, kaj ĝusta kono de la montanaj vivado kaj kreskajaro montriĝas en ĉiuj paĝoj de « Urso ». La maldika ĉeno, kiu kunigas la ĉarmajn pentraĵojn, el kiuj konsistas precipe la verko, estas plene agraba kaj sufiĉas por teni la atenton de tiuj, kiuj volas iom da dramo meze de la plej ravaj priskriboj.

Kiel Paŭlo Deltur fianĉigis kun Berto Meral meze de l' grandiozaj Alpoj; kiel kaprica junulino postulas de li kolekton de malofta floro; kiel li fine — post malagrablaj aventuroj — sukcesas akiri la deziritan aman garantiaĵon; kiel Urso rakontas al nia heroo siajn malfeliĉojn kaj eldiras sian filozofion, formas teksaĵon interesan, ornamitan per delikataj pentroj de l' bela arbara naturo, faritaj de unu el ĝiaj fervoraj amantoj.

La poezioj, kiujn mi aludis ĉi supre, estas represitaj je la fino de l' volumo: « En montoj » ĉarmos tiujn, kiuj ne povas

resti sensentaj aŭtaŭ la majesta spektaklo de l' naturo. (Ĉe P. E. S. — Sen prezo).

« *Mallumaĵoj* » esperantigaĵo laŭ Abonyi Arpad, de Lengyel Pal, teknika direktoro de la esperantista presejo, estas interesa rakonto, mistera kiel komprenigas la titolo: batalo de du fieraj animoj, dividitaj de mistero, kiu, klarigante je la fino de l' rakonto, donas okazon al Si montri, ke en ĉiu virina koro estas fonto je boneco kaj delikateco.

Kontraŭe al « *La interrompita kanto* » la verko finiĝas per sunradio. Intence mi estis malluma! La scienculoj legu! (Ĉe Presa Esp. Societo).

« *La Serĉado por la ora ŝaflano* » laŭ la angla rakonto de Nathaniel Hawthorne. La aŭtoroj J. C. O'Connor, Ph. Dr., M. A., kaj S^o C. F. Hayes tre bone tradukis la verkon kaj lasis al ĝi la tutan ĉarmon de l'angla karakteriza sprito. La libro ĝuis la kliŝaĵojn de l'angla eldonaĵo kaj apud ĉiu teksta paĝo estas granda bildo arte desegnita de B. Le Fanu: Ĉe W. T. Stead's Publishing House, 39. Whitefriars street, London, E. C. La angla volumo: 0, fr. 20 af.

« *Cindrulino* », esp. de L. Milho, estas la dua ilustrita eldonaĵo por infanoj de la kolekto de « *Espero Katolika* ». Multaj plum-desegnoj akompanas la tekston. Ni deziras al tiu libreto, kiun paĉjoĵ devas aĉeti al siaj infanoj, kontentigan sukceson (0 f. 60 afr. 15, R. Etienne Pallu, Tours).

Ni parolis antaŭ ne longe pri la libro unua de la « *Plena Verkaro* » de S^o V. N. Dzvjatniin, eldonita de la franca firmo Hachette k. K^o. Nun estas eldonita de S^o D. P. Vejsbrut, presisto de « *Ruslanda Esperantisto* », la libro dua de l' Plena Verkaro. Kiel la unua, ĝi enhavas verkojn originalajn aŭ tradukojn tre interesajn, nome: « *Edziĝo* », komedio en tri aktoj; « *Arturo* », rakonto por Sinjorinoj tro amemaj; « *Ludilo de Sorto* » kaj « *Episkopo* », versaĵoj; « *Poltavo* », poemo de l' fama A. Puŝkin.

Tiu volumo per sia formo kiel per sia ŝtofo estas akirinda (1 rbl 25 k, afr, ĉe D. P. Vejsbrut, St-Peterburgo, Troickij pr., 14).

La pliampleksiĝo de « *Espero Katolika* » nun efektiviĝis. La revuo enhavas 32 paĝojn sub ilustrita kovrilo kaj havas grandan intereson por la personoj okupiĝantaj pri la religiaj aferoj.

La redaktoro, abato Peltier, penadas por starigi unuigon de kristanaro, kaj li jam ricevis aprobajn respondojn de diversaj pastroj kaj religiaj personoj de malsamaj landoj. Estas tie interesa provo, kies sukceso estos nova argumento por Esperanto.

S^o P. Pujula y Vallés tradukis katalanen la fundamentan gramatikon de D^{ro} Zamenhof. (10 cent., plaça del teatre, 6, entreso, Barcelona).

La sama propagandisto preparas « *Gramàtica Catalana Esperanto* » kaj « *Vocabulari Esperanto-Catala* ». Jen estas bonaj signoj de l' progresoj de nia ideo en Katalanujo, kie ekzistas la Societo « *Espero Kataluna* »: prez. S^o Johano Kosals (Portaperriga, 30, l'irovendoĵo).

Ni ricevis « *Rondiranta folio por la kreado de Socia Revuo* », kiu celas varbi legantojn kaj abonantojn ebligantaj eldonon de grava « *Tutmonda Socia Revuo* », kaj kiu enhavas tri klarigajn artikolojn: « *Al la Socialistoj, al la Anarĥistoj, niaj planoj kaj projektoj* ».

Por informoj, sin turni al la « *Cercle Communiste, Genève* ».

Ŝo Ĉefeĉ, la eltrovema elpensito de l' ŝlosiloj kaj poŝtkartoj propagandaj nun eldonis kovertojn similajn, kiuj ankaŭ tute taŭgas por atentigi pri Esperanto (100 kovertoj: 1,80 fr.; 1000: 16 fr. — 45, Christchurch Road, Streatham, London, S. W.).

Jen tri verkoj kapablaj atentigi, diversmaniere, pri Esperanto:

« *La evangeljo sankta Mateo* », laŭ D^{ro} Martin Luther, tradukita de du agemaj Leipzigaj esperantistoj, S^{roj} Mielek kaj Stephan (J. C. Heinrichs'sche Buchhandlung, Leipzig. Ricevebla de Esperanto Verlag Möller et Borel, Berlin S., Prinzenstr. 95 — Mk. 0,50).

Kiel diras nia kunfrato « *Germana Esperantisto* », l' apero de la unua traduko esperanta de Evangelio estas certe grava okazintaĵo en la bibliografia kroniko de nia lingvo.

La verko, tradukita laŭ la Lutera Biblio, enhavas antaŭparolon de eminenta leipziga pastro D^{ro} Jeremias. Ĝi estas la unua ŝtupo de biblia verko, tiom dezirata jam de multaj sami-

deanoj, pro la universala disvastiĝo de la Biblio. Estas dezireble ke ŝtuparo baldaŭ konstruiĝu.

S^o George Ledger, el « *Brita Esperantista Asocio* » eldonis « *Pitman's phonography adapted to Esperanto* ». Al ĉiuj specialistoj anglaj ni rekomendas tiun verkon belete eldonitan. (Ĉe B. E. A.)

En la turista bieno eldoniĝis « *Kondukanto al belega Skotlando* » (Ĉe Geo. Higgle & Co, Rhothesay, Glasgow, Skotlando: I penco): Bonega libreto enhavanta kuriozajn detalojn pri la bela kaj fama aludata lando.

Agema itala propagandisto, S^o Jakobo Meazzini eldonis italan tradukon de la sceneto de S^o Cart, « *Une heure d'Esperanto* » (*Unu horon pri Esperanto*), jam fama en Francujo, kaj ankaŭ en Germanujo dank' al la traduko presita en « *Germana Esperantisto* », kaj verkita de nia kunlaboranto Otto Simon.

Se estas, en nia legantaro, iu kiu havas iom da simpatio por la belsona itala lingvo, ni rekomendas al li la broŝuron, en kiu li legos la puran italan lingvaĵon, korekte uzatan de l' Toskanoj.

La ampleksaj adresaroj estas, kompreneble, tre utilaj ĉar ili donas ideon de la disvastiĝo de nia afero; sed, ofte, la adresoj ne plu estas ĝustaj kiam ili aperas, ĉar ili havas kiel fundamento sciigojn ne ĉiam novajn.

Societo « *Espero* » en Peterburgo eldonis, sub direktado de nia kunlaboranto E. Radvan Ripinski, tre utilan verketon: « *Ĝenero esperantista* » enhavanta precizajn adresojn de Esperantistoj kun ĝi rilatantaj, kaj kiuj, pro tio, estas konfidindaj. Ni tre rekomendas tiun broŝuron kies prezo estas 50 cent. ĉe Societo « *Espero* », en Peterburgo.

« *Les mots Esperanto groupés d'après le sens* », de Marcel Bobin, libro por francelingvanoj, kies titolo klarigas sufiĉe la enhavon. Povos esti tre utila al la komencantoj, al la profesoroj kaj ankaŭ al la aŭtoroj.

« *Instruado de Esperanto per bildaro* (figuraro) », de S^o Pro Cart. Estas ĝeneraligo de l' procedo kiun ni aplikis en kelke da niaj tekstetoj « *Por la Propagando* ». Ni jam parolis pri tiu uzo farita de S^o Cart en siaj kursoj, kiu konsistas instrui amuzante. Ĝus eldonita « *Commentaire (franca) kaj Questionnaire (esperanta)* » bonege plenigas la libreton. Fine, franca eldono: « *Le Français enseigné par l'Image* », sekvota de similaj germana kaj angla volumoj, aplikas la procedon por lernado de parolataj lingvoj.

(Tiu 4 broŝuroj ĉe Presa Esp. Societo).

Kelkaj bonaj propagandiloj aperis:

De S^o W. B. Cook, ĉe « *The Esperanto Agency* » en Glasgow (Skotlando): « *Esperanto, the auxiliary international language* » (1 penco);

de D^{ro} Sacquet el Nantes (Francujo) nia tre agema propagandisto: « *Le 1^{er} Congrès Espérantiste à Boulogne-sur-Mer* », eltirita el « *Annales de la Société Académique* »;

« *Kvarvojaĵoj por Esperantistoj* », enhavas 6 kantojn eltiritajn el la « *Fundamenta Krestomatio* ». Tiu verko, zorge eldonita de « *Brita Esperantista Asocio* », estas bonega propagandilo, precipe en la manoj de niaj britaj samideanoj, kiuj multe ŝatas ĥore kanti (0 fr. 70 afr. ĉe B. E. A., 13, Arundel Street Strand, London).

Prof. Luigi Giambene, prez^{to} de Societo « *Imperiosa Civitas Esperantista* », publikigis utilan verkon por niaj italaj amikoj: « *Vocabolario Italiano-Esperanto* ». (Lire 1,25, ĉe Libreria Internazionale, Via delle Convertite, 18, Roma). La Societo akceptas plezure viziton de samideanoj (82, Via Monteroni).

La aktiveco de l' belgaj Esperantistoj, pri kiu ni ofte parolis, okazigis fondon de « *Belga ligo esperantista* ». Tiu Societo presigis novan eldonon de sia propagandilo « *L'Esperanto, solution du problème de la langue Internationale auxiliaire* », plenigita per la lastaj progresoj de nia afero.

Ĝus aperis la 3^a eldono de l' bonega lernolibro de S^o Deligny, pri kiu ni parolis (0 fr. 80 afr. ĉe « *T. I. M.* »).

A. MONTROSIER kaj STELETO.

La Elsputo de Monto-Pel , en La Martiniko

de Ing ROLLET DE L'ISLE (Francujo).

La terura elsputo de Vezuvio rememorigis alian faman katastrofon: tiun kaŭzitan de Monto-Pel  en La Martiniko. S. Rollet de l'Isle, distinginda hidrografa inĝeniero, oficeiro de la honora legio, kiu partoprenis en la misio Laeroix, sendita por studi la fenomenon, bonvolis eltiri el sia poŝkajero la jenajn interesajn fragmentojn. La ilustraĵoj estas malpliigaj laŭ fotografajoj de S. Laeroix, presitaj en belan volumon eldonitan de la firmo Masson & Cie, Parizo.

La gazetoj sciigas ke la trian de Marto, perforta tertremo skuegis *Martinikon*, kaj ke la loĝantoj de *Fort de France*, timantaj pro la renversigo de iliaj domoj kaj la plialtiĝo de la maro kiu supreniras la bordojn, alkuris al la kamparo. Kaj tiuj malgajigitaj sciigoj, kiuj montras ke tiu malfeliĉa insulo ankoraŭ suferadas, memorigas min pri la neforgesebla vizito kiun mi faris al ĝi, tuj post la katastrofo en kiu malaperis, kun siaj dudek kvin miloj da loĝantoj, la urbo *St Pierre* en la monato de Majo 1902.

Mi trovas en miaj tiamaj notoj kelkajn impresojn.


...La poŝtŝipo, sur kiu ni alveturas el Francujo, alproksimiĝas la Martinikon. Kliniĝantaj sur la ferdekbalkono ni, kortremante, alrigardas horizonton.... Griza maso, apenaŭ videbla tra la nebulo aperas iom post iom: estas *Monto Pel *, la elsputanta vulkano, kaŭzo de la malfeliĉego; sube nubego de blankaj vaporoj vidiĝas la malaltaj krutaĵoj de la marbordo. Nun ni vidas la detalojn de la kamparo: ĉio estas griza, palega kaj griza; la arboj, la dometoj, la ŝtonoj estas unuforme grizaj kaj, antaŭenirante, ni eniras en nubon da polvo, en kiu ĉio malaperas....; tiu polvo pikas niajn okulojn, kaj rapide la ferdeko de la ŝipo, niaj vestaĵoj fariĝas ankaŭ grizaj... Tiu polvo estas la cindro kiu elflugas el la kratero, kaj kiun la vento alportas sur la maron, malproksimen....

De la pinto de la vulkano ĝis la marbordo estas deklivaĵo, disŝirata per profundaj fendegoj...; el kelkaj de tiuj ĉi supreniras blankaj vaporoj.... per la hela suno, la ombroj estas violkoloraj, la altaĵoj blankegaj. Tiu senfina spaco palega kaj silenta ŝajnas nekredible terura kaj samtempe tio estas belega....

Malproksime aperas urbo sed dezerta, silenta urbo, griza ankaŭ, kies domoj ne plu havas tegmentojn, kies arboj ne plu havas nek foliojn nek

branĉojn, kies fenestroj estas malfermitaj kiel la okuloj de skeleto.... kaj subite, antaŭenirante ankoraŭ, ni ekvidas ke tiuj domoj havas nur du murojn, ĉar la internaj muroj falis.... En kelkaj lokoj, multepeza kaj nigra fumo malrapide flugas: estas derompaĵoj kiuj ankoraŭ brulas de unu monato....

Kaj, ĉiam antaŭenirante, jen la vidaĵo ŝanĝas tute, post promontoro. Nun estas la tropika kamparo kun sia tuta beleco, kaj anstataŭ la terura kaj inferna naturaĵo, kiun ni ĵus vidis, ni admiras la fortikegan kaj multkoloran kreskajaron de la varmegaj landoj....



LA RUINOJ DE ST. PIERRE.

Ni suprenrampis hieraŭ ĝis la kratero. Post kiam ni veturis sur ĉevaloj dum du horoj, tra kamparo ĉiam kovrita de la eterna griza polvo, ni alvenis al la bordo de la parto tute dezertigita: nek arbo, nek herbero, nur dika tavolo de malmoligita koto, ankaŭ griza.... Ni suprenrampas piede dum unu horo sur tiu ghtiganta tero, al la pinto kaŝita per la nuboj super kiuj, kelkafolje, plialtiĝas masoj da blankaj vaporoj... nun ni troviĝas en malseka nebulo kaj marŝas en gluanta koto, en kiu ni internigiĝas ĝis genuoj....; en kelkaj lokoj, ŝtonegoj aperas sur la kota tavolo: estas pecoj da lafo elŝprucigitaj de la vulkano, kiuj fendigiĝas sekigante.... La vulkano kiel *Monto Pel * ne havas fluan lafon: ili nur havas tre dikan lafon kiun oni nomas france « *and site* », kiu eliras el la kratero nur en pecoj, kaj kiun ili elĵetas kiam la interna premo sufiĉas por eksplodigi. Kun tiu lafo, ili sputas grandegan mason da vaporoj je tre alta temperaturo, kaj estas certe, ke estas tia vaporoj elsputigita kun fortega rapideco, kiu detruis la urbon St. Pierre.... Sub ŝtonego, ni trovas malgrandan beston duone boligita: estas speco de mustelo nomita « *manicou* » (maniku) kiu eble surprizita de la elsputo, ricevis la varmegan vaporon.... Jen ni estas ĵus al la bordo


de la kratero: trans kru-
taĵo, sur kiu ni kliniĝas,
malfermiĝas profunde-
gaĵo, kies fundon oni ne
vidas, en kiu flugas blan-
kaj kaj densaj vaporoj,
en kiu oni aŭdas raŭkajn
bruegojn, en kiu oni flar-
as fortegajn sulfurajn
odorojn. Forta vento el-
pelas kelkafoje tiujn
vaporojn, turniĝadigas
ilin.... kaj, subite, ni
ricevas fortegan pluve-
gon kaj ni, tute malsekaj
per tiu akvo, kiu falas
kiel elverŝita de ia gran-
dega sitelo, malsupren-
iras la deklivaĵon, kiu
nun fariĝas kota toren-
to.....

Ni elŝipiĝas ĉe St.Pier-
re sur ruiniĝintan kajon
kaj malrapide ni antaŭ-
eniras tra la detruigita
urbo. Tuj ni flaras mal-
bonan odoron, miksaĵon
de bruliĝinta viando kaj
de alkoholo.... La malvi-
vuloj, kiujn oni ne povis
eltiri el la rubaĵoj (tim-
ante ke la maloftaj mur-
oj ankoraŭ starantaj fa-
lu sur la laborantojn) pu-
tras per la varmega su-
no: kelkaj brulas per la
brulado, kiun la alta tem-
peraturo de la vulkana
nubo ekfajrigis; kaj ali-
parte la fabrikejoj de rumo
ankaŭ brulas.... Muŝoj
nekalkuleblaj zumas ĉirkaŭ
ni kaj ni devas forpeli
ilin ĉar ilia piko estus mort-
iganta. Tra la senordaj
amasoj da ŝtonoj, ni marŝas
malrapide ekvidante
strangajn okazaĵojn, kiujn
unu ŝajnas nekompre-
neblaj: partojn de loĝejoj
tute freŝajn ĉe ruiniĝintaj
domoj; kradojn tordiĝintajn
per la tajro apud lignaj
mebloj eĉ ne nigriĝintaj;
pecojn de muro kiuj
staras kiel mirakle kaj
ke infano, puŝante ilin,
faligus. Arboj estas nu-
diĝintaj kun ŝelo bruli-
ĝinta ĉe la flanko kiu
rigardas la vulkanon, sen-
difektaj ĉe la mala flanko;
tiuj kiuj falis kuŝas je
la direkto mala de
la kratero, renversigitaj



Ni forte petas niajn legant-
ojn ne mendi verkojn kies
prezo ne estas presita en niaj
kolonoj.

Ni instigas ilin uzi la okaz-
on de sia abona renovigo
por mendi verkojn, kiujn ili
deziras akiri: tio ŝparas du-



VARMEGA NUBO. ALTO 4000m.



ĈE L' BORDO D' L' KRATEERO.

per la fortego de la va-
poro elŝprucigita, forte-
go tiel granda ke ĝi fa-
ligis la lumturon, kies
ŝtonoj estas disjetitaj tra
la marbordo, kaj ke la
plataj ŝtonoj, kiuj kovris
la tombojn ĉe la tomb-
ejo, glitis sur la vertikalaj
ŝtonoj sur kiuj ili kuŝis.
Poste, ni iras al la rivero
kiu trafluas la urbon;
flava kaj dika estas ĝia
akvo, kiu, alvenante al la
maro, restas je la sup-
raĵo kaj montras larĝajn
dubblankajn makulojn
kiuj etendiĝas malprok-
simen en la bluj ond-
oj.... La pontoj ĉiam ek-
zistas; ni trairas unu el
ili kaj iras viziti kvartal-
on kiu estis plej prok-
sima de la vulkano; tie
ĉi, ĉio malaperis, eĉ oni
ne vidas ruiniĝintajn
murojn: cindro, nivelig-
ita per la pluvoj, ĉion kov-
ris; kaj, de la rivero ĝis
la vulkano, oni vidas nur
grandegan ebenajon,
ankoraŭ grizan kaj pa-
legan...

Subite, tuj kiam ni
forveturis, ni aŭdas raŭ-
kan bruon elvenantan el
la vulkano, kaj ni vidas
amasojn da blankaj vaporoj
ŝprucantan el la kratero....
rapide la alteco de tiu
nubo pligrandiĝas kaj sam-
tempe ĝi, kun terura
rapideco, rulas al la maro.
Feliĉe ĝi ne alvenas al
ni, sed kontraŭe ĝi laŭiras
profundegaĵon, en kiu
antaŭ la katastrofo fluis
torento. Tiu nubego konsi-
stas el multnombraj mal-
grandaj nubetoj ĉiam
elvolvigantaj, supertur-
niĝantaj unu la aliajn,
kaj ĝi similas grandegan
florbrasikon....; alvenante
al la maro, ĝi havas altecon
ĉirkaŭ ses mil metroj kaj
tiam la ventego puŝas
ĝin sur la supraĵon de la
ondoj, kie ĝi baldaŭ mal-
aperas, pluvigante ama-
son da brulanta cindro....

Originale verkita de
ING^{TO} ROLLET DE L'ISLE.
(Francujo).



blajn korespondon kaj kost-
ojn.

Ni rekomendas al ili la «Al-
bumon de konataj Esperant-
istoj» kaj «Unuan Ĉapitron
de miaj memorskriboj», de
nia ĉefredaktoro, laŭ la fama
Akademiano Fr. Coppée (2
fr. 40 afr. kaj 0 fr. 75 afr.)



La Hejma Vivado de la Anglino

De F^{ino} C. OXFENFORD.

Ian tagon la ĉefredaktoro de tiu ĉi bona « Tra la Mondo » petis de mi, ke mi skribu ion pri la hejma vivado de la angla virino; senpripiense mi konsentis. Jen la rezulto.

Neniam pli malfacilan taskon li povos trudi al mi, ĉar la hejma vivado de la virino estas tre simila en ĉiuj landoj. Se ŝi estas edzino, ŝi zorgas pri siaj edzo kaj infanoj-kelkafoje; se ŝi ne estas edzino, ŝi zorgas pri la edzo, la infanoj de ia alia virino-generale. Ĉu mia diro ne estas vera? Ĉirkaŭrigardu, kaj vi vidos. Estas nur la virinoj kiuj studas unu aŭ alian el la artoj kaj sciencoj, kiuj ne almenaŭ helpas zorgi pri la edzo kaj infanoj en ia hejmo; ĉu ŝi estas nur servistino aŭ tiu bonega provizo de l' naturo — La Fraŭl-onklino. Pripensadu, kio okazus se ne estus fraŭl-onklinoj!

Sed la jena ne estas tio, kion la ĉefredaktoro deziras.

Estus pli facile skribi pri la malhejma vivado de la angla virino. En Anglujo la virinoj rilatas al la viroj kiel sep rilatas al unu; tial la Virina (grandan V. mi petas, S^{ro} Presisto) demando estas nacia problemo. « Kion fari el nia knabinoj » estis la titolo, se mi ĝuste memoras, de grandega, longega korespondado, kiun antaŭ kelkaj jaroj oni presis en unu el la ĉiutagaj ĵurnaloj.

La respondo al tiu demando povas esti trovata nuntempe en la oficejoj, la fabrikoj, la butikoj. Ĉie virinoj estas trovataj farantaj la laboron, kiun antaŭe estis farata de viroj.

Ne plu longe junulino atendas hejme ĝis viro venos, kiu bonvole laboros por ŝia pano; ne, nune ŝi laboras por sia propra pano, kaj restadas libera. Ne plu longe estas mallaudinde, ke fraŭlino laboru en publikaj butikoj aŭ oficejoj, eĉ inter tiuj klasoj, kiuj antaŭe levis la manojn pro teruro kaj malestimeco je la ideo. Kvankam estas pli multe ol iam da fraŭl-onklinoj, tamen ŝi tre malsimilas sian fratinton de antaŭ tridek jaroj, aŭ eĉ dudek jaroj.

Libroj post libroj povus esti skribitaj pri la ŝanĝitaj ideoj de kaj pri virinoj en Anglujo dum la lastaj kvin-dek jaroj. Ĉu kelkaj el la ŝanĝoj estas bonaj, estas iom dube, sed ke la plej multo da virinoj estas pli bonaj, fizike kaj spirite, pro tiuj ŝanĝoj, estas tute ne diskuteble.

Ne plu ni svenas ĉe la vido de muŝo — aŭ de viro; ne plu ni restadas hejme, edzino aŭ ne, kaj malsaniĝas pro manko de freŝa aero, kaj ekzerco, tial ke ne estas korekte, ke virino promenadu publike. Ne plu ni estas malkapablaj, dependaj, mallogikaj, malsaĝaj. . . sed estos pli bone, se mi haltos, aŭ mi ricevos la tondrojn de ĉiuj ... sinjorinoj kvindek-jaraj.

Sufiĉas, ke nune la virinoj de Anglujo estas ... nu, unuvorte,

la plej mirindaj virinoj en la mondo; kaj nia hejma vivado estas la plej feliĉa, la plej gaja, plej komforta vivado, kiun oni povus deziri. Feliĉega la viro, kiu gajnos anglinon por esti sia edzino! Ni povas fari ion kaj ĉion — esceptime — sed ne, estas pli diskrete, ke mi ne skribu tion kion ni ne povas fari. Mi ne deziras altiri al mi la koleron de ĉiuj el miaj samlanduloj, kiuj legos tion ĉi.


Ĉu mi aŭdas nian ĉefredaktoron dirantan, ke mi devas esti pli serioza, ke li deziras veran rakonton pri la Anglinoj kaj ne sencecaĵon? Sed, kara redaktoro, ĉu mi ne skribas la veron? Ĉu ni anglaj virinoj ne verkas librojn; muzikon; komediojn; tragediojn; poezion; ĉu ni ne faras pentraĵojn, ne parolante pri...; ĉu ni ne estas politikistinoj; instruistinoj; aktorinoj; skribaŝinistinoj; fabrikantinoj; redaktoroj; rajdistinoj; « Hockey » istinoj; flegistinoj (la lastaj estas tre necesaj kelkafoje, ludinte « Hockey »); fakte, kiaj ajn istinoj oni povas priskribi; kaj laŭ ĵurnalistino, ni estas fine lernintaj bone porti niajn vestojn! Voila! Sed ĉiam esceptinte la solan agon, kiun ni anglinoj neniam — neniam — neniam povas fari, pro manko de... sed ne, ne, mi ne ĝin diros.

Hodiaŭ mi legis en la « Daily Telegraph »: — « Oni diras al ni, ke la situacio de la virino en Anglujo, nune, estas vere mirinda. En okcidenta Londono, sep el dek butikoj ekzistas sole por la virinoj. La ĉefaj ĵurnaloj rezervas pli kaj pli da spaco por presi aferojn kiuj interesas ŝin. ... La devenon de la pligrandiĝo de la nombro de teatroj kaj restoracioj oni ŝildas al ŝi. Jen estas nobla lando! La butikoj de la « haut monde »; ĵurnaloj; teatroj kaj restoracioj, ĉiuj dezirantaj fari ĉion, kion virino volas! Kion plu ia estaĵo povus deziri? La miraĵo estas tio, ke estante tiel altigita, Virino iam klinas ŝin ĝisrigardi virojn aŭ paroli kun ili! »

Tio estas kion mi legis, kaj estas vera. La virino regnas en Anglujo, kvankam la Viro ne konfesos tion.

Nu, kiel vi ŝatas mian virinan artikoleton? Ne multe? Tio estas pardonebla, ĉar ho! kara Redaktoro, se vi estus en Anglujo kaj povus legi la sennombrajn gazetojn — ĵurnalojn — librojn — por virinoj, de virinoj, pri virinoj, baldaŭ vi estus tiel enuigita pro virinoj kiel mi, kaj mi estas certa, ke neniam vi dezirus skribi virinan paĝon por ia ajn ĵurnalo, ... sed mi forgesas, kompreneble vi ne povus skribi tion, simple ĉar nenio restas por skribi pri virinoj!

Originale verkita por TRA LA MONDO de
C. OXFENFORD.



La Fabrikado de l' Pipoj en Jura.

Originalo de MAURICE DAVID, el St. Claude (Francujo).

Rigardante pipon, tiun malgrandan tabakfumilon, atakatan de keikaj, sed kiom fervore amegatan de aliaj, neniu ja suspektas, ke ĝia produktado okupas multe da laboristoj, kaj nepre tute scias ĝian fabrikmanieron. La jena prisribeto povu alporti al la legantaro de la tiel ŝatata revuo «Tra la Mondo» sufiĉe da konindaĵoj por ĝin interesi.

Pipoj estas el diversaj materioj, nome :

Marsaŭmo, argilo, mola kaj malmola ligno, porcelano, metalo.

Iliaj buŝtuboj ankaŭ, nome :

Sukceno, celuloido, korno, malmoligita kaŭĉuko (vulkanito aŭ ebonito).

Hodiaŭ ni pritraktos nur la materiojn de la pipoj mem, por ne trouzi unufoje la lokon rizervitan por tiu temo.

Porcelano, marsaŭmo kaj argilo estas ĉiuj facilrompeblaj; plue la dua estas multekosta; metalo (plej ofte arĝento), kontraŭe fortika, havigas je la fumo akran guston. Tial ni okupos nin precipe pri la lignaj pipoj, kiuj la cititajn difektojn ne posedas, almenaŭ tiuj el malmola ligno, kiel *eriko*, aŭ pli bone *radiko de eriko*.

Eriko (*erica arborescens*), monopetala arbeto du ĝis trimetra, kreskas en la suda Eŭropo, Italujo (Kalabro), Hispanujo, Pirenea Francujo kaj eĉ en Alĝerio. Ĝia ŝtipforma radiko, elsekigita post bolado, montras belan rozkoloron, delikatajn vejnojn kaj punktojn. Plue erika radiko dolĉigas la fumon kaj la fumado iom post iom ĝin ornamas per nigra rondo, kiu *progrese* paligigas meze, plimalpaligigas al la ekstremajoj de la pipo (forna supro kaj tuba finiĝo).

La senformaj stipetoj bezonas aliformigojn tre multajn antaŭ ol povi esti elmetataj en la montrajn fenestrojn de vendistoj.

Unue laboristoj tornas kaj boras ilin sur speciala stablo; ili estas nomataj *skizistoj*. Poste *raspistoj* forigas, per mana manovro, la lignajn pecetojn ne atingebajn de la skizmaŝino. Sed tiam la pipo estas ja malglata, sen buŝtubo. Tiam ĉi kuntenigas la *fiksistoj*, tiun elglatigas *poluristinoj*. Pro la polvo disigata de tiu lasta laboro la poluristinoj envolas sian hararon en ne senoriginaleca, kolora tukaĵo, kiu donas al ili vidiĝon de Turkoj. Post poluro, pipo ne jam estas sufiĉe luksa: kolorigilo ruĝa aŭ bruna pli malpli pala allogigas ĝiajn vejnojn, metala ringo, aŭ kovrilo el kupro nikelita, blanka kupro (majŝor'o) polurita, arĝento, eĉ oro, ornamas la pipon lafoje speciala sistemo estas uzata por kolekti, poste por eligi el la pipo, ĉiun tabakan aŭ buŝan sukun; aliafoje oni skulptas en ĝi foliaron, beston, eĉ tutan grupon; aŭ la forno prezentas la kapon de fama homo, de io personigita. La pipoj de oni povas diri, ke ĝeno estas negligata por ke la pipo trovi, rilate al sia prezo, posedanton je pli aŭ malpli alta rango, sed ĉiam amikon, kontraŭ kiu ĝi nepre restados fidela...



LA SKIZISTOJ KAJ RASPISTOJ.



LA POLURISTINOJ.

Finante, mi rememorigu, ke pipo ne malutilas la sanon kiel cigaro aŭ cigaredo. Tion de longe komprenis la angloj kiuj nune, laŭ ekzemplo montrita de ilia samlanda aristokrataro, ne timas sin montri en ĉiuj partoj de la mondo kun, en la buŝo, sia mallonga pipo el erikradiko.

La legantoj de «Tra la Mondo» ne estas perdintaj sian tempon legante la jenan artikolon, ĉar ili estas konatigintaj kun antaŭe nesciata de ili kreskaĵo: *Eriko*, rajte nominda *Piparbo*.

La legantoj de «Tra la Mondo» ne estas perdintaj sian tempon legante la jenan artikolon, ĉar ili estas konatigintaj kun antaŭe nesciata de ili kreskaĵo: *Eriko*, rajte nominda *Piparbo*.

Originale verkis MAURICE DAVID,
el St. Claude (Jura).

Tubo estas la parto de la pipo, kiu finiĝas sub la forno. Buŝtubo estas l'aparato enmetota en la buŝon, fiksita kun la tubo.

La vorto: Trunketo, per kiu oni nomas l'unuan en la pipfabriklokoj ne estas ĝusta, ĉar ja oni parolas pri radiko, kiu tute ne havas trunketon?

Pipon sen buŝtubo oni nomas «kapo».



Nia enketo pri ĉiulanda Edukado.

Inter interesaj novaj dokumentoj ricevitaj, ni citu ilustritan manuskripton de S^{no} Hulanicka pri la virina edukado en Rusujo, kaj tre plenan raporton de S^o James Knight, rektoro de l' S^{to} James Public School, Glasgow, pri la edukada sistemo en Skotlando.

Tiu lasta sendo montras kiel atentinda estas juĝata nia enketo. Oni, do, daŭru sendi materialon por ĝi, aŭ sendigi kiel faris nia sindona skota propagandisto, S^o Buchanan, al kiu ni devas la valoran kunlaboradon de l' tre estiminda S^o J. Knight.

Koran dankon al «Espero Katolika», al «Germana Esperantisto», al «l'Espérantiste» kaj al «Sunio Hispana», kiuj admonis siajn legantojn partopreni en la enketo.

Kun aparta plezuro ni legis la alvokon faritan en tiu lasta gazeto, kiu tamen, aliparte, daŭrigis la diskuton komencitan kun ni, presante longan leteron, al kiu ni ne volis respondi en nia lasta numero.

Ni esperas ke nia modereco kaj la senpartia alvoko de «Sunio Hispana» por nia enketo faciligos restarigon de interrilatoj tiaj, kiaj ili devas ekzisti inter estimindaj homoj (fr.: braves gens), celantaj nur la sukceson de l' kaŭzo, kiun ili amas kaj servas.

«T. I. M.»

La Torento el Ŝaŭmo

Originalo de DANIEL LESUEUR (Francujo) (S^{vo}).

— Kiu estas tie? Ĉu vi, frato? Mi vin atendis nur matene.

Rapida suprenirado ekmovis la ŝtupojn. La pordoĵ bruege frapis. Alumeto kraketis. La bruna maldelikata vizaĝo, la nerva profilo de l'akcizisto aperis:

— Levigu, Niko, ordonis li.

— Kion vi havas? Kial tiu ĉi mieno?... Vi min timigas, Teo.

— Jam pasis momento, de kiam vi timas? mokridis ŝia frato, metante kupran lampon antikvaforman tutproksime al ŝia vizaĝo. Vi estas tre pala, Niko. Ĉu vi ne vidis la radion de l' lumjetilo sur la monto kaj la ĉasaĵon, kiun li lumigis?

— Tiu kompatinda mizerulo, kiun vi observis?... Sed jes.... Li ne havis la plej malgrandan pakon da negocaĵoj. Negrava kontrabandisto, tre certe.

— Vere?...?

Li krucigis siajn brakojn, kaj rigardis ŝin kun ironia kruelegeco. La belega figuraĵo kiu ŝi estis, anstataŭ kortuŝi Nello'n en tiu ĉi momento, nur incitegis lian furiozon. La gracia kreitaĵo estis tro delikate bela por edziniĝi je maldelikatulo, kaj resti en la vilaĝo. La penso, ke ŝi intencis forlasi lian observadon, eble foriri kun la delogiinto, kaj ke tiu karaĝa fratino, sankta heredaĵo de liaj gepatroj, fariĝus hazarda kreitaĵo, kies nomon oni ĉiam elparolus en la lando kun malestimo kaj mokado, frenezigis lin. Unuafoje, sur la simplanimaj trajtoj li rimarkis penadon por mensogi. Kvankam ŝi estis pura, Veroniko ne kuraĝis diri la veron. Mistero eniĝis en ŝian animon. Por tiu mistero, ŝi timis..... ankoraŭ pli multe ol por sia propra vivo.

Rapide vestita, havanta ruĝan ŝaleton sur la ŝultroj, ŝi timeme demandis:

— Kion mi devas fari? Kien vi volas konduki min?...

Poste, esperante deturni la konversacion:

— Ne por iri eksteren?... Aŭskultu.... ho! kia fulmotondro!.... Ĉu vi aŭdas tiun bruon sur la vitraĵoj?

— Certe, diris Matteo. Ĉarma bruo por mi. La hajlo kaj la pluvo tre baldaŭ malkvietigos la akvojn de l' monto. Via franca sentaŭgulo estos ja devigata eliri el la groto por ricevi la pafon, kiun mi sendos al li de l' fenestro. Venu por vidi.

Inter la furiozeco de viro kaj la furiozeco de l' akvoj.

— Tion vi ne faros, Teo!.... Tion vi ne faros, perforte kriis Veroniko.

— Tiu estas do li! furioze kriis Nello, malafable prenante ŝian manradikon. Ha! Tiu estas li!... Mi ne estis certa pri tio. Kaj vi lin atendis, friponino!.... Al li vi estis proponinta rendevuon..... Tie ĉi!.... en la domo en kiu mortis niaj gepatroj!.... Diable!.... Dank'al mia deĵoro, kiu forestadigis min la tutan nokton, vi estis tre trankvilaj!...

Li ne permesis aliajn klarigojn, kaj perforte repuŝis sian fratino, kiu protestis petegante, ke li aŭskultu. La kolerego de l' akcizisto ŝajnis teruran kvietecon. Sur lia vizaĝo savaĝe energia, liaj nigraj okuloj havis mortigeman ŝajnon. Veroniko, timigita, konsciis, ke la paroloj kaj la pluregoj estus senefikaj.

La viro tamen trenis ŝin ĝis fenestro rigardanta

la monton. Kiam li palpis la nilon, li turnis sin ankoraŭ pli ebria pro kolero.

— Ha! Ha! Vi ne havis tempon por fermi ĝin! Vi nur puŝis ĝin, kiam vi min aŭdis venantan. Ĉu vi neos ankoraŭ, ke vi estis tie ĉi, ameme sekvante per la okuloj tiun malbonulon, tiun rabiston de honoro?...?

Nun silentis Veroniko, duonsvenante. Sed kion ŝi ekvidis, kiam la fenestro estis malfermita, tio restarigis ŝin kun freneza korpremo. L'elektra radio igis videbla kiel dum plena taglumo — tre proksime laŭ rekta linio — la malfermaĵon de l' kaverno; kaj de tiu malfermaĵo ekŝprucis kio ankoraŭ estis nur rivereto, kio preskaŭ subite fariĝos tumultondega katarakto. Tion observinte multfoje, ŝi havis certecon, ke tio okazus tiamaniere: kiam pluvego, kiel tiu falanta ankoraŭ, estus plialtiginta la nivelon de l' natura sifono, la tuta lago suprenirus, repuŝita de l' atmosfera premo. La fremdulo, tie kaŝita, tion ne povis scii; li imagos nur gradan pliiĝon rilatan al la pluvego, falanta jam pli malrapide, pensos, ke li havas tempon por eliri el tie; kaj la bela Franco, kun blondaj lipharoj, karesemaj okuloj, ne estis forlasinta sian rifuĝejon, ĉar la tura lumo estis ankoraŭ antaŭ ĝi.

Tamen Matteo Nello pretigis sian pafilon.

— Li estas kie mi volis! li murmuris. L' akvo.... aŭ la plumba pruno. Nepre, li mortos.

Kaj, tial ke la torento ŝveligis iĝis fantazie belega en la blinda lumjetado.

— Eliru do, kanajlo! Estu mi, kaj ne la Rivero kiu mortigu vin!

Muĝado, pli bruega de sekundo al sekundo, superis la koleregan voĉon. Unu fojon plue, la fenomeno plemuniĝis. La monto vomis sian furiozan ondon. Nun la malhela faŭko, kiun ĝi malfermis en la ŝtonego, sufokiĝis pli ol duone pro la furiozeco de l' akvoj. Se la viro estas ankoraŭ tie, kiel li kontraŭbatalos la timegindan enspiradon de tiu fluida maso? Ĝi certe atingis lian talion. Post momento ĝi atingos liajn ŝultrojn.

Korŝiranta ekkrio, senvole eljetita de Veroniko, ekremetigis Matteo'n mem. Tiu momento estis tragedia kaj tenebra. Homa formo, igita fantomo de tiuj lumjetoj kaj blankaĵoj, de Pelektraj rebriloj, de l' ŝaŭmo, de l' pluvo, eliris el la nigra truo, glitis ŝanceliĝante al la malfermaĵo.... Malklara apero eliranta el la ondo neĝa, apenaŭ distingebla... Fantomo malbone videbla, alkroĉiĝinta al la ŝtonego... Ĉu ĝi estis ja vivanto?... Kial ĝi ne antaŭensaltis ekster la fluida infero? Ĉu ĝi jam ne havis eblecon aŭ fortecon por tion fari?

Anstataŭ antaŭeniri, tiu apero ŝajnis ŝanceliĝi malantaŭen.

Matteo, kiu estis apoginta sian pafilon ĉe l' ŝultro, mallevis la ĉanon. Ne sufiĉe rapide. Lia fratino sin jetis sur la pafilon, kiu dekliniĝis. La pafilo flugis, hazarde, al la monto, kiu malŝate repuŝis la mallortan kugletaĵon, dum malpeza korpo, frapita de bruta pugno, falis planken, sveninta.

(Daŭranta.)

Trad. kun permeso de l' aŭtorino,
de JOHANINO FLOURENS.



ARTISTA Aŭ LITERATURA VIVADO



Elisabeth Barrett-Browning.

De Odilino PRUDENT (Francujo).

Anglujo ĵus festis la centan datrevenon de Elisabeth Barrett-Browning, unu el la plej altaj kaj famaj poetinoj el tiuj centjaro kaj lando.

«Tra la Mondo» esperas interesi siajn legantojn presante la sekvantan resumon pri la vivo de tiu ĉi genia virino, kaj la esperantan tradukon de poĵo el ŝia plej bela poemo: Aurora Leigh.

Antaŭ unu centjaro, Elisabeth Barrett (1806-61) naskiĝis en Londono. Malforta konstitucio donis al ŝi longajn jarojn el malsanoj kaj doloroj.

Sed la sufero, anstataŭ senkuraĝigi ŝian animon, pligrandigis, plinobligis kaj pliharmoniigis ĝin.

Fraŭlino Barrett ricevis plenan kaj superan instrucon kaj edukitecon. Ŝi studis funde klasikajn aŭtorojn — ŝi povis legi flue grekajn kaj latinajn tekstojn — filozofian kaj sciencajn.

La literaturo konis jam la nomon de Fino Barrett per kelkaj artikoloj elirintaj en revuoj kaj per kelkaj poetaj verketoj aperintaj en la 1844aj, kiam ŝi edziniĝis je la fama poeto Robert Browning (1846).

Poste, ŝi elirigis: La Dramon de l' Ekzilito; — La aperaĵojn de la Poetoj; — Casa Guidi Windows; poemojn skribitajn en Firenzo (1848) — admirindajn sonetojn de la Portuga; tradukon de l' Enĉenigita Promete'o, de Eschyle; fine, Aurora Leigh, versan romanon, sian ĉefverkon (1856).

La poezio de Elisabeth Browning, kiu havas eksterordan altecon en la pensoj kaj pasion en la sentoj, estas esprimita per belega, stranga, plenkolora lingvo kun mirindaj lirismaj flugoj.

Angla Pejzaĝo.

Eliraĵo el «Aurora Leigh».

Turdoj kantis, kaj mia sango kaj la junaj folioj de l' ulmoj agitiĝis. Kaj tiam mi turniĝis, levis mian

fingron kaj rimarkigis al li (1) ke, kvankam la mondo estas tre malbona, — laŭ lia diro — tamen en ĝi kantadas la turdoj.

Je tiuj ĉi vortoj, lia frunto kvietiĝis kaj lia sufero iĝis melankolia sed sen malamo dum, entuziasmo elfluanta el mi, mi gloris tiel faras la poetoj — la belecon de la ĉirkaŭa kamparo, la ĉielon, la nubojn, la kampojn, la feliĉajn violojn kiuj kaŝiĝas ekster

la vojoj, la primolojn kovrantajn la deklivojn per ĉia ora tapiŝo; la dornajn arbetojn vivigitajn per birdoj kaj larĝaj blankaj papilioj, kiuj saĝnigas kvazaŭ majaj floroj vivigis kaj tremetus tra l' vento; montetojn, valojn, arbarojn ĉirkaŭprenitajn en arĝenta nebulo; farmdomojn, garbejojn disemmitajn tra montetoj, kaj brutaron sin paŝtanta en valoj; kaj kamentojn de la dometoj fumantaj el l' arbaro; kaj la ĝardenojn elspirantajn ĉie parfumon miksatan kun la bonodoro de fruktoĝardenoj.

Vidu, mi ekkriis, vidu ĉu Dio ne estas kun ni sur tero? Kiu ne timas diri, ke nenio estas por mizerulo kaj kulpulo, sed nur malriĉeco kaj krimo!

Rigardu! Kaj mi eksaltis kaj eniĝis ĝis mia maleolo en la anglan herbon, kaj mi frapis miajn manojn, kaj proklamis ĉion ĉi belega!

Esperantigita de

ODILINO PRUDENT.



Kl. el «Les Annales».
ELISABETH BARRETT-BROWNING.
Fama poelino angla.

(1) *Aŭroro parolas pri sia kuzo.*

« La tragedio de l' homo »

de EMERIKO MADACH (I), esperante resumita de ARNOLDO GÖLTL.

Tiu ĉi grandfama drama poezio enhavas la vivon, la bataladon de la homaro, la eternan batalon de la bono kun la malbono. La homo senĉese aspiras al la belo, bono ; sed la materio, kiu estas parto de lia estaĵo, tiras lin al la tero, sed ne povas elmortigi lian aspiradon al la ideoj ; se li ankaŭ falas (tio ĉi estas sia tragiko), li ne falas sen gloro, sed en nobla batalado. La aspirado de nia animo al la ideoj vivigas la virinon, kiu estas la fidela akompanantino de nia batalado. La dia fajrero aperas ĵus en nia aspiro, en nia batalado por la noblo, kiun Lucifero, la spirito de la neesto, ne povas kompreni. Madach en emocia, kortuŝanta drama desegnaĵo prezentas tiun ĉi bataladon, por kiu li prunteprenas la datojn de la biblio, historio monda kaj filozofio, sed tiujn ĉi uzante, por sia fundamenta ideo, kun poeta libereco. Ne tiel en la arta formo montriĝas la merito de la verko, kiel en la nekomparebla granda forto de la poetaj pensoj, en la profundeco de la percepto, en la riĉeco de la ideoj kaj en la belegeco de la konstruo. Tiu ĉi verko, kiun oni prave komparas kun « Faŭsto » de Goethe, estas unu el la plej altegaj poemoj filozofiaj de la novepoko.

Jen sekvas la mallonga enbavo.

Post la finiĝo de la kreo de la mondo ankaŭ Lucifero, la spirito de la neesto, petas parton por malbonigi la kreon. La Sinjoro donacas al li du malbenitajn arbojn meze de Edeno, la arbojn de la sciado kaj de la vivo. Per tiuj ĉi Lucifero volas la homon malbonigi. La unuan homan paron, feliĉe en Paradizo vivantan, Lucifero logadas per la frukto de la arbo de l' sciado kaj senmorteco : Evo ŝiras frukton de la unua ; sed la duan, Sinjoro malpermesas al ili ; kaj tial, ke Adamo kaj Evo malobeis lian ordonon, li lasas ilin solaj. La unua homa paro foriĝas el Paradizo, post kio Adamo sentas grandan malkontentecon en sia koro, ĉar lia korpo estas alligita al la materio, kiu, kiel kateno, ĉirkaŭprenas lian spiriton. Adamo volas ekkoni la esencon de la materio, post kio Lucifero montras al li la tutan ĥemian iradon de la natura fariĝo ; el tio Adamo vidas, ke li estas nur malgrandega parto de la tuto. Poste aperas la spirito de l' Mondo, sed Adamo ne komprenas kion signifas la spirito de l' Mondo aperanta antaŭ li en figuraĵoj de nimfoj arabaj kaj akvaj. Li tion volas scii : kia estonto atendas lin ? Tiam Lucifero envolvas lin per dormo kaj tiel vidigas al li la estonton de la universa homo. En Egiptujo, kiel Farao, Adamo vivas por la gloro, serĉante en ĝi la feliĉon, sed fine li trovas, ke la vivo de milionoj da homoj estas tro granda prezo por tiu ĉi vana sonĝo ; en Atenoj, kiel Miltiades, li servas per malegoista honoramo la interesojn de la amaso, sed li konvinkigigas pri la vanteco ankaŭ de tio ĉi. Poste li, en Romo kiel Sergiolus, jetas sin en la ondojn de la voluptoj, sed ankaŭ tio ĉi plenigas lin je naŭzo, li petas helpon de Dio, post kio aperas al li apostolo Petro anoncanta la novan mondon, la venkon de la kristana ideo. Post tio la poeto kondukas nin en la

batalojn de l' krucaj militiroj. Adamo revenas el la Sankta Lando enkorpiĝinta en Tankred', sed li rigardas en Konstantinopolo la fortegajn reciprokajn batalojn de la kristanoj, kiuj prezentas al li sian individuan bataladon senfruktan, sed lia spirito forrapidas al la scienco. Kiel Kepler, li vivas en la novepoko por la astronomio, sed ne povas eviti la tiamajn superstiĉojn : li ekdonas sin al l' antaŭdirado por povi subteni sian malŝpareman edzinon ; tiu ĉi fariĝas nefidela je li kaj Adamo, malĝojega pro la pigmeeco de la tempo, batalas al nova celo. Meze de la franca revolucio, li aperas antaŭ ni en la figuro de Danton, de lia laboro sangan soifanta ankaŭ tie ĉi ne rezultas savo, ankaŭ li mem falas, superita de Robespierre, pri kiu li antaŭdiras, ke la granda amaso ankaŭ trenos lin sur la gilotinon. Tiam Adamo denove prenas la figuron de Kepler, kiu, dum lia edzino lin malŝateme perfidas, esploras la profundaĵojn de la scienco ; sed li konvinkigigas, ke ankaŭ la scienco ne povas esti fina celo, kaj atendas de la estonto la korpigon de la senbarila individuo libereco. Tion ĉi, akompanata de Lucifero, li rigardas en Londono, sed la materio ankaŭ tie ĉi malbonigas la spiriton, la libera konkurado malaltigas ĉiun idealon ; la arto fariĝas populudo, la virina virto — peko ; sed Evo ne timas, ke la amon kaj poezion venkos la monda skorio kaj la morto, kiu estas la komuna sorto de la homaro malbonigita. Tiam aperas la estonto de la homaro, kiam la homoj vivas en falansteroj, la individuo plene enfandiĝas en la tuto ; sed la naturo en ili vivanta, la forto de la individuo ribelas ankaŭ kontraŭ la ordo maŝinca ; kaj la komunismo ne faras la homojn pli feliĉaj, ol ne povis tion la supereco de la individuo super la amaso.

Lucifero nun portas Adamon en la grandan mondospacon, kie li volas obstini kontraŭ la spiriton de la Mondo, sed li devas konvinkigi, ke li estas kunligata kun tiu ĉi Mondo, kiel parto nedisigebla. Sed la Mondo malrapidege malvarmiĝas, la homo fariĝas malsaĝa Eskimo, post kio Adamo malespere petas Lucifron finiĝi lian dormadon ; tio ĉi okazas. Adamo ekvekiĝas kaj kun tio ĉi finiĝas la serio de la historiaj figuraĵoj. Nun la poeto kondukas nin denove sur la lokon de la tria sceno. Adamo rememoras siajn pentraĵojn dormajn, li malesperas je sia estonto kaj tial, ke li estas ankoraŭ nun la sola homo, li volas fari finon al sia tuta raso. Sed Evo trompas lin dirante ke ŝi estos baldaŭ patrino. Tiam Adamo ekgenufleksante diras : « Sinjoro ! Vi min venkis. Jen mi kuŝas en polvo, sen Vi, kontraŭ Vi mi vane batalos. Levigu min aŭ ĵetu min teren, mi malfermos mian bruston ! » Sinjoro pardonas la konvertiĝanton, redonas al li la antaŭvidecon kaj kuraĝigante admonas lin : « Batalu kaj konfidu ! »

ARNOLDO GÖLTL,

Nagyiszeben (Hungarujo).

(I) Fama hungara verkisto.

Ibrahim'

Persa novelo, de DOKTORO BUSUTIL (Malta).

En Ŝirvano, persa provinco, de longatempe trankvila paco ekzistis, kaj la feliĉa loĝantaro kontentege ĝuadis la bonstaton, kiun nur saĝa princo scias havigi al siaj regatoj.

Tiu ĉi princo estis Ibrahim', kiu zorgante pri la feliĉeco de siaj popoloj, per saĝaj leĝoj moderigante sian registaron, tre atentante por ke lia ministraro donu al ĉiuj honestan justecon, favorante la terkulturon kaj la artojn, disdonante ŝage laŭ la merito premiojn aŭ punojn, sciis firme fondi la trankvilecon en ĉiu loko, tien enkonduki gajan kaj feliĉan sufiĉegecon.

Kiam tiuj popoloj estis ĉe la plej alta grado de la feliĉeco, kaj dankeme benadis sian sinjoron, jen okazis malĝoja anonco, kiu alportis al ĉiuj la plej kruelan konsternon: la fiera Tamerlan', la tiam teruro de Azio, avidanta ĉiam pli vastigi la limojn de sia imperio al provinco Ŝirvano, jam alproksimiĝas kune kun multenombra armeo por ĝin submeti kaj pliigi siajn venkojn.

Pro tiu malgaja sciigo, Ibrahim', pli sindona por sia popolo, kiun li jam pense vidas minacata de la plej gravaj malfeliĉegoj, ol por si mem, tuj kunvenigis sian ministraron, por ke ĝi kun li decidu, kion ili estas farontaj. Oznam' la armea generalo, fiera kaj kuraĝa viro: « Kontraŭbatali! — li tuj ekkriis, — ni bezonas batali; li venu, la sovaĝa Tamerlan'! Tie ĉi li trovos tiun, kiu fine humiligos lian fierecon; estas neniu el ni, Reĝo, kiu por vi por viaj filoj, por viaj kampoj ne estas preta por disverŝi sian sangon. Eksciu, la malhumilulo, kiom estas malfacile venki popolojn decidintajn plivole perdi ĉion, ol submetiĝi al lia fiera jugo! »

Tiam aliflanke leviĝis Lizbek', la gardisto de la reĝaj trezoroj: « Mi, — li diris, — la unua el ĉiuj, Sinjoro, oferas mian vivon kaj mian sangon por vi se vi decidis kontraŭbatali, kaj se vi kredos ke per tio, ni povos eviti la danĝeron. Sed kiamaniere nia armeo tiel malmultenombra, kaj pro longdaŭra paco ne preparita por militado, povos sufiĉe lin kontraŭbatali? Ni devos, laŭ mi, prefere petegi la pacon, se nur oni povas esperi ian pacon de la kruela Tamerlan', kaj ne ricevi netolereblan kaj hontindan sklavecon.

Mi ne trovas alian rimedon krom la forkuro. Mi konsilas, ke vi transportigu vin mem kaj viajn trezorojn en alian landon; fidelaj, ni sekvos vin kien ajn al vi plaĉos aliri; Tamerlan', ne restos longatempe en senhoma lando. Lia ambicio lin forkondukos al pli malproksimaj almlilitadoj, kaj eble, post la tumulto, la ĉielo malfermos novan vojon al ni, por ke ni revenu nian patrolandon, kaj reeniru niajn hejmojn. »

La opinioj de la ĉeestantoj estis malsamaj; unuj volis kontraŭ la forton de Tamerlan' kontraŭmeti

la forton kaj la kuraĝon; la aliaj, juĝis, ke estus pli saĝe eviti la perforton per la forkuro.

Ibrahim', aŭskultinta la opiniojn de la du partioj: « Mi laŭdas, — li diris, — la kuraĝon kaj la indon de tiuj, kiuj estas pretaj por riski sian vivon por mi; kaj pro tiuj ĉi pruvoj, mia amo al vi pli forte kreskus se mi povus ami vin plie, sed precize mia amo al vi ne volas, ke mi ekvidu sangon verŝitan por mi, sangon kiu estas tiel kara al mi. La forkuro povus esti tre utila al mi, sed pli kaj pli fiera pro mia forkuro, la kolero de Tamerlan' suferigus la malfeliĉulojn, kiuj fariĝus la kaptajo de lia furiozeco.

Laŭdata tamen estu la ĉielo, kiu inspiras al mi pli bonan konsilon, kaj per kiu, espereble, mi savos vin ĉiujn; baldaŭ vi tion ekscios. Dume, fervore preĝpetu la ĉielon, por ke ĝi sukcesu. »

Disiginte la kunsidon, li tuj ekpreparis riĉegajn donacojn ĉiuspecajn, kaj kun tiuj ĉi, li decidis aliri renkonte al Tamerlan', por ricevi de li la savon de sia popolo.

Estis kutimo ĉe Tamerlan' kaj ordono de li farita ĉe sia kortego, ke la donacoj prezentotaj al li devas konsisti el naŭ specoj.

Konformante sin al tiu ordono, Ibrahim' alvenis al Tamerlan' kaj prezentis al li naŭ belegajn ĉevalojn riĉege jungitajn kaj ornamitajn je oro kaj perloj; naŭ leopardojn, dresitajn por la ĉasado, kun belaj oraj ĉirkaŭkoloj; naŭ silkajn tendojn ore kaj arĝente tre delikate broditajn; naŭ tapiŝojn el Hindolando tre lerte prilaboritajn, naŭ orajn vazojn konturigitajn je multkostaj gemoj, kaj aliajn donacojn riĉegajn. Fine li prezentis al la reĝo kelkajn sklavojn sed ili estis nur okope.

« Kie estas la alia sklavo? » tiam fiere demandis la barbara reĝo.

« Li estas ĉe viaj piedoj, diris Ibrahim' kuŝigante teren antaŭ li, — Vi ne havos sklavon pli obeeman ol mi, kaj treege dolĉaj estos por mi miaj la katenoj, se per ili, mi ricevos de vi la savon kaj la liberecon de mia kompatinda popolo. Oh! kompatu ĝin, ĝi estu savita, agu kun mi laŭ via volo, mi apartenas al vi. »

Kortuŝite pro tia boneco, tiu animo, nature sovaĝa tute ŝanĝiĝis. Afable relevante lin: « Ĉio alio, — li diris, — ol la sklaveco estas ŝuldata al tiel bela virto. Vi estos la plej ŝatata el miaj plej intimaj amikoj; mi rigardas vin kiel frato kaj patro. Feliĉe realiru al via popolo, daŭrigu kontentigi ĝin kiel vi ĝis nun faris; se al entreprenoj pli vastaj kaj pli gloraj mia sorto ne alvokus min, mi ne scius pli grandan plezuron ol vivi en malgranda reĝolando, ĉion farante por vin imiti. »

D^o GUSTAVE BUSUTIL.
Malta.



Ĉe l' sojlo de l'amo.

Originale verkis E. RADVAN-RIPINSKI (Rusuĵo).

Ŝi estis superaĝe maturiĝinta dektrijara knabino, lernantino de mezgrada lernejo. Plenvizaĝa, rozvanga, grandokula, kun ĉiama ĉarma rideto sur purpuraj delikataj lipoj, kun palebrunaj bukloj kaj kaprice kaj koketeme elrampantaj sur altan fronton, kaj vestita en mallonga palflava jupeto, nigraj longaj ŝtrumpoj kaj ruĝetaĵ ŝuoj, — ŝi tute spiradis per enviinda orĵuneco, printempa belegeco kaj senzorga gajeco, tiel kutime propra por ĉiusamaĝulino, tuŝita jam de nenia disreviganta kaj senkompate-venenanta vivblovado. Ŝin oni nomis Aleksandrinjo Soleva, aŭ simple, Ŝura.

Li estis jam tridekdujara mezaĝulo, elkreskinta en senviva provinco, en aristokrata nobela familio, komence en la prizorgoj de maljuna vartistino, eniĝinta en lin, por ĉiam, veran idealismon, nesubaĉeteblan honestecon kaj puran esencon de gloraj dogmoj de Kristo, poste ageme subtenatajn, dum plua maturiĝo, de la patro en liaj intimaj interparoladoj kun sia filo. Nur patrina influo, pri fanatikeco, hipokriteco kaj pri estimo kaj indeco de homoj pro ilia klasa deveno, faris por la filo nenan rezultaton kaj, kontraŭe, eĉ iom deturnis lian koron de ŝi. Sekve de tiu edukado, li, dum sia juneco, trovis por si neniajn kolegojn kaj kreskis tute sola, allasita al si mem kun sia aparta vidpunkto pri la mondo, memstaraj observoj kaj konkludoj, admiranto de la belegeco de l' naturo, adoranta la muzikon, la poezion, ĉirkaŭita de amaso da libroj, neordinare scivolema kaj nekorekteble revanta pri universala enrego de l' idealo sur la tero kaj pri ĝia orepoko en kunfratiĝo de l' homoj.

Pasadis nepetegeblaj jaroj post jaroj. Ne elprovinde la amon, li edziĝis por ne esti sola kaj por frankvile kaj senmalhelpo sin okupadi per memedukado kaj scienca studado, dum libertempo de l' servo sole subtenanta lian modestan ekzistadon. Ĝis la supremontrita mezaĝo li ŝajnis kontentigita de l' aranĝo de sia familvivo, tute ne rimarkante ĝian senkolorecon kaj unutonecon, ne rimarkante, ke reale ĉirkaŭ li regis malluma, mortiga nokto... kaj li, kontenta, eĉ miris pri diroj de konatuloj pri neelpor- tebleco de simila vivo, terura kaj mortiga, varmigata kaj lumigata de nenio.

Per kaprica sorto li estis enjetita en grandan ĉefurbon, brueman kaj bolantan de vivo, kaj tie li nur ankoraŭ pliprofundigis en sia studado, estante limigata de nenio en sia proviziĝo de bezona materialo, tiom mankinta por li en nepostulema kaj dormanta provinco.

Kaj jen tie li, tute okaze, renkontiĝis kun Ŝura. Io ekmoviĝis en la ŝimanta koro de l' mezaĝulo, sentinta nenan amon. Ŝi ofte enkuradis lian laboran kabineton, plenigadis ĝiajn silentemajn murojn per melodia sonora rido kaj senĉesa gaja pepado, alpremiĝadis lian ŝultron, enrigardadis per siaj bluaj okuloj liajn okulojn, elaŭskultadis scivoleme liajn rakontojn pri la belegeco de l' naturo, plezuroj liver-

ataj de l' vivo, pri l' universala rearanĝo de l' terekzistado je l' vidpunkto sociala; enpeniĝadis mem, ĉarme kaj naivinfane rediradis, kaj... subite forti- radis lin de l' apogseĝo, petegante kun ŝi promeni, aŭ petoli kaj turniĝadi kun ŝi; ŝi alportadis al li bonodorajn buketojn kaj starigis ilin en akvujojn sur lia skribtablo kaj ornamadis sur la lasta, per kapricformaj rubandaj bantoj, la diversajn objektojn.

Ŝi plioftigis vizitadon kaj... unufoje kaj sekretege de lia edzino, neatendite sin jetinte al la kolo kaj premiginte ĝin rapidmove per brakoj, varmege kisis lin, sin konfesante pri sia amo kaj ekjurante, en la venonto nepre fariĝi.. lia edzino.

Li, frapegita, kun batanta koro, ekforsaltis de ŝi, de tiu infano, kvazaŭ pikita de serpento, kaj kun bruo renversis la apogseĝon... Ŝi, do, ruĝiĝinta, momente forlasis la kabineton...

Ŝi enamiĝis lin! Tiu ĉi ĉarma infano ekamis lin, homon foririntan de l' mondo ekstera, homon enpolvigitan en laborado filozofia, homon ne konintan la amon kaj, por tio, ve, tro maljunan por ŝi.

Kaj li enfermis sin en la kabineto, plu ne enlasante ŝin; sed jam lia interna trankvileco forestis, liacerbo ne plu laboris, kaj lia vekigiĝinta koro — kien nedeteneble ekfluegis la ondoj de ia, ne elprovita de li, dolĉega sento — sopiris pri ŝi kaj postulis vidi ŝin.

Ĉu amo?! Ĉu tio povas esti? Jes, amo, unua pura malfruiĝinta amo. Kaj li ĉirkaŭrigardis: antaŭ li staris, supersŭtita de libroj kaj paperoj, lia malnova, silentema amiko — lia skribtablo; en la kontraŭa angulo, ion kudris lia fidela, kaj iom pliaĝa ol li, edzino, nun ŝajnanta al li, kompare kun pepantolino, tro maljuna, neinteresa, eĉ — malbela; sole lia filino, ludanta sur tapiŝo, faris je li nenan mala- grablan impreson.

Kaj subite lin tutan ĉirkaŭprenis nepriskribebla sopiro pri sia vane perdita juneco; li ekvidis fine nokton lin ĉirkaŭantan, li komprenis la senkolorecon de sia vivo kaj ĝian mortintecon kaj... en malespero, surda malespero, li ekmallevis rapidmove la kapon al siaj manoj krucigitaj sur la tablo, kaj unufoje en sia vivo, serioze ekprenis pri sia persona situacio, helpebla de nenia filozofio, nenia forto en la mondo.

En lia koro komenciĝis kruela batalo inter vekigiĝinta pasia amo kaj la morala devo de familiano. Vere, la devo supervenkis, sed la unua hela, kaj eble la lasta radio de l' suno de vivo ne preterlasis lin senpostsigne: ĝi disakordigas iom post iom lian nervaron, elsekigas lian cerbon kaj pretigas por li teruran venonton. La naturo ne toleras kontraŭaĵon; kaj la suno de l' vivo pereigas kune kun la mallumo, ankaŭ ĉion ial ne povantan disiĝi de tiu mallumo!

E. RADVAN-RIPINSKI
(Rusuĵo)



Virina amo.

Legendo libere rakontita de HALDOR MIDTHUS (Norvegujo).

La jusa morto de Haldor Midthus, unu el niaj plej malnovaj samideanoj, kaj el la plej sindonaj kaj lertaj, estas kruela perdo por la Esperantistaro. Malsana de longe kaj ne povanta kunlabori en « Tra la Mondo », li volis almenaŭ doni al la revuo satindan estimpruvon, interrilatigante nin kun alia distingita norvega samideano, S^{ro} Nils Okland. Dank' al la afableco de S^{ro} Dreves Uitterdijk, eksredaktoro de Holanda Pioniro, ni povas hodiaŭ esprimi la jenan interesan legendon.

L' anĝeloj en la ĉielo kantas harmoniajn kantojn kaj ludas siajn belegajn harpojn.

La muzikaj sonoj fluadas al la trono de Dio. Pli ĉarmaj ol la aliaj sonoradas harpo kaj kanto de Seralim. Tiam la voĉo de Dio estas aŭdata, tiel parolanta al li:

« Granda amo elradas de via kanto; tial mi faros al vi donacon. Postulu, kaj estu donata al vi tio, kion vi deziras ». Seralim respondas: « Donu do al mi permeson viziti la homajn spiritojn, kiuj estas turmentataj en la purigfajro, ĉar ili tie suferas nedireblan malbonon sub la potenco de Infero. Mi deziras veturi tien por ilin konsoli per miaj kantoj kaj per la sono de mia harpo.

— Vian deziron mi plenumos, — Dio respondas: iru tien kaj faru tion, kion vi volos, vi, la plej nobla inter la anĝeloj! »

Denove Seralim laŭdas Dion, dum li, per la helpo de siaj ĉielarkokoloraj flugiloj tuj flugas al ia luma stelo en la nemezurbela spaco ĉiela.

Alproksimiĝante la stelon, li aŭdas dolorkriojn de tiuj homaj spiritoj, kiuj tie estas purigantaj, dum ili samtempe estas turmentataj de senkompataj demonoj.

Tiu ĉi terura loko tamen ne estas la efektiva Infero. — Ili videtas malproksime la brilan ĝardenon de l' Paradizo. Ili ankaŭ videtas tie la senmortajn homojn promeni inter la belegaj arboj, trinkante el fonto de l' vivo. Ili esperas iam alveni tien, kie troviĝas tiuj ĉi feliĉuloj. Post longa tempo, kiam estos forigita ilia malpuraĵo, tiam ankaŭ la punado estos finita. La espero ilin konsolas dum ilia suferado. Jen estas la diferenco inter l' Infero kaj la loko de l' purigfajro.

L' anĝelo, alveninte tien, kunvolvis siajn brilajn flugilojn. Li iris tra kristala pordego kaj, post kelkaj momentoj, sidigis sur ŝtonegon. Dum li kantas konsolan kanton kaj dum li ludas sian ĉarmegan harpon, li baldaŭ alportas pacon por la malfeliĉaj suferuloj.

Ankaŭ la demonoj ĉesis turmenti la homajn spiritojn. — Tute same kiel ia laca homo, per sia dormado forgesas sian malĝojon kaj doloron, tiel la spirita mizeruloj ankaŭ tuj trankviliĝis kaj kvietigis, dum ili aŭskultadis la belsonon de la ĉarma kanto kaj la ludon de la anĝelo. Nur solan voĉon li ankaŭ aŭdis plenantan plorege kaj senĉese: ĝi estis virina voĉo. Ree kaj ree ŝi vokis: Ho, Adenhejm, Adenhejm, ne funebru, ĉar vi min perdis!

L' anĝelo nun ludadas siajn plej belajn melodiojn, kaj la tremantaj kordoj de l' harpo sonoradas tiel molaj kaj ĉarmaj kiel la ĉiela ĥoro. La virina spirito tamen sentas aŭ konscias nenion el tio. Senhalte ŝi nur plendante vokas: Ho, Adenhejm, Adenhejm, ne tiel multe funebru, ĉar vi min perdis!

Seralim, aŭdante tion, sentis por ŝi grandan simpatian kaj kompaton. Li iris tien, kie estis aŭdata la dolorega voĉo. Baldaŭ li tie trovis virinan spiriton, junan kaj belegan, sin apogantan sur ŝtonego, dum la demonoj kuŝis lacaj kaj indiferentaj ĉe ŝia flanko. Al ĉi tiuj li demandas: ĉu mia kanto estas la kaŭzo, kial vi tiel restadas?

Ne, ili respondas; ni precipe estas senlaboraj, ĉar ŝi pro sia malĝojo kaj kompatato por ia homo ne sentas doloron per nia turmentado. — L' anĝelo nun alproksimiĝis kaj parolis al ŝi: « Kial vi, filino de l' tero, ĉiam tiel grandege kaj senĉese plendas? Mia harpo kutime havas potencon pacigi kaj kontentigi eĉ la plej grandajn kulpantojn; — kial do ĝi ne simile povas vin kvietigi? — O, brila nekonatulo, ŝi malĝoje respondis, vi nun alparolas al estajno, kiu en la tera vivo amis kreitaĵon pli ol ŝi amis la kreinton.

Mi tial juste estis kondamnata suferi punadon en tiu ĉi loko; sed mi scias, ke la malfeliĉa Adenhejm senĉese funebrias mian morton, kaj la pensado pri lia malĝojo min pli dolorigas ol ĉiuj turmentoj de l' demonoj — Kiel vi do scias, ke tiel senĉese funebrias vian morton? demandis l' anĝelo. — Ho, jes,

mi ĝin scias, respondis la sincera sed tro malsaga spirito; mi scias, ke mi tiel estus funebranta pro li, se mi lin perdis! » Komplete Seralim diris al ŝi:

« Diru al mi, ĉu vi havas specialan deziron, kaj tiam mi — laŭ mia povo — provos kvietigi vian doloron » Ĝojegante, la spirito etendis siajn senkorpajn, aerajn, brakojn kaj petegis: « Permesu al mi, ke mi tuj povu reveni teren por resti tie nur unu horon, por ree vidi mian Adenhejmon! Mi kaŝos por li mian estaman punadon kaj mian propran, grandan, doloron; mi nur deziras doni al li konsolon!

L' anĝelo ne tuj respondis.

Tamen, post iom da tempo, li respondis al ŝi: « Mi povas plenumi vian peton, sed sciigo mankas al vi pri la punado, kio rezultos el tio. Vi povas reveni al la tero, sed pro la unu hora daŭrado, kion vi denove restos sur la tero, vi estos devigata suferi unu milon da jaroj tie ĉi en novaj turmentoj.

— Ĉu tio estas ĉio?! ekkriis la ekscitita spirito. Volonte mi submetas min al tia punado! Se mi nur dum unu horo povos konsoli mian amatan Adenhejmon, tiam mi paciense suferos la estontajn turmentojn ».

Seralim nun tuŝis per sia fingro la suferantan spiriton, kiu ankoraŭ staris antaŭ li kun siaj ombraj brakoj etenditaj. Tuj la pordego malfermiĝis kaj jen — la spirito revenis al la homa mondo...

Estas nokto. S^{ro} Adenhejm sidas ĉe sia lumigita tablo vespermanĝa. Ĉirkaŭ li gajegaj voĉoj, ŝercoj kaj ridegoj sonas.

Kiel partoprenanto en tio, li preskaŭ superas la aliajn. Ĉe sia dekstra flanko sidas bela virino. Ŝi estas fraŭlino Falkenberg. S^{ro} Adenhejm ofte sin turnas al ŝi por mallaŭte diri ĉe ŝiaj oreloj kelkajn agrablajn vortojn.

La fraŭlino ridetante sin turnas al li kaj diras: « Ĉu mi povas kredi viajn vortojn? Ĉu vi ne antaŭe juris simile, ke vi tiel varmege amas fraŭlinon Ida — filinon de S^{ro} Loden — kaj ĝis nun nur pasis tri mallongaj monatoj post ŝia enterigo?! — Je mia eterna feliĉo, vi ja estas maljusta kontraŭ via propra beleco! respondis Adenhejm. Ida — ho — vi hontigas min! Ĉu vi efektive povis kredi, ke mi iateme amis la filinon de Loden?! Tiam mi okaze ne povus plene ŝati vian indon Ne, ne! Nur iaj ĝentilaj vortoj, nur kelkaj afablaj ridetoj, jen estas mia tuta amo por Ida. Ŝi erare komprenis miajn komplezojn, kaj tial ŝi eble imagis ilin kvazaŭ amo. Ne, karega fraŭlino, mia koro tute estas via! »

En la sama momento aŭdis S^{ro} Adenhejm, apud sia flanko, pezan ĝemon. Li sin rapide turnis por vidi la ĝemanton, sed li nur vidis kvazaŭ luman nebuleton, kiu baldaŭ disigis kaj malaperis. Ne estis necese, ke Ida plu malkaŝu sin por S^{ro} Adenhejm?! Kiam la spirito denove eniris la brulegan lokon, tiam anĝelo Seralim demandis al ŝi: « Ĉu vi plenumis vian intencion konsoli vian malĝojan amikon? » Ida kompatinde kaj malespere respondis: « Tuj ordonu al ĉiuj demonoj, ke ili rekomencu sian turmentadon! » L' anĝelo diris: « Rememoru ke vi — pro via reveno al la tero — miljare plilongigis vian punadon.

— Ho, jes, ŝi respondis; mi alestis nur unuan horon denove sur la tero, kaj post tia horo mi jam ne plu timas miljaran punadon tie ĉi »

Ree Seralim ludis sian harpon en la ĉiela ĥoro kaj ree Dio parolis al li: « Mi plenumos vian deziron, kvankam vi ĝin ne elparolis! Tuj konduku la purigantan spiriton, Ida Loden, al ŝia ĉarma loko en la Paradizo, ĉar ŝi jam ne havas sian Dion sur la tero; tial la miljara punado estu mallongigata ĝis nur unuhora daŭro ».

Akompanata de l' tuta ĉiela ĥoro, la anĝelo nun alportis — dum ĝoja kanto kaj ludo — fraŭlinon Ida al la bela ĝardeno de l' Paradizo.

HALDOR MIDTHUS.

MIKS AJ O J.

POR LA PROPAGANDO.

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gram-ojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj «vortaron ebligantan tuj kaj senpre- pare deĉifri kaj legi ĉion esperante skri- bitan» Emmeteblaj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesiĝi je Esperanto, donante samtempe la gepatraling- van « ŝlosilon » de Sinjoro Ĉefeĉe.

Ŝtof'o el arane'aj faden'o'j. — Jam mult'a'j aŭtor'o'j rimark'ig'is al scienc'ul'ar'o kaj industri'ist'ar'o la fortik'ec'o'n kaj mult'ec'o'n de la faden'o'j de special'a'j arane'o'j nom'at'a'j «Halabe» de la Ma'degas'an'o'j, kaj kies nom'o scienc'a est'as « neptida madagascariensis ». La faden'o'j de tiu grand'eg'ul'a arane'o, tre fortik'a'j kaj tre long'a'j simil'as la plej riĉ'a'n silk'o'n orang'kolor'a'n aŭ or'a'n. Por ili'n hav'i sufiĉ'as prem'i inter fingr'o'j la dik'eg'a'n ventr'o'n de l' arane'o kaj en'volv'i la faden'o'n sur ŝpin'il'o aŭ bobeno; la font'o ŝajn'as sen'fin'a. Post est'i liver'int'a, tiel'e, grand'a'n kvant'o'n da silk'o, l'arane'o ne ŝajn'as sufer'i pro tio. Kun faden'o'j de tiu spec'o est'as ebl'e lev'i pez'o'n da 500 gram'o'j. Ceter'e en ia'j part'o'j de la grand'a insul'o, en land'o de « Betsileos » la faden'o de l' « halabe » est'as uz'at'a kiel faden'o de la en'land'ul'o'j por kudr'ad'o de ili'aj veŝ't'o'j.

(Société entomologique de France). Tradukis 7068.

PROBLEMO 47^a (de Karulino).

- • • • • besteto
- • • • • respondo
- • • • • legomo
- • • • • instrumento
- • • • • neŝangebla vorto
- • • • • gramatika finiĝo.

PROBLEMO 48^a (DE LA SAMA).

Manĝu mian kapon, tiam mi vin aŭskultas; elprenu mian novan kapon kaj vi veturos sur mi.

PROBLEMO 49^a (DE M. FINOT).

El ĉiu el la subaj vortoj elektu tri literojn, legu ilin laŭ la ordo trovita kaj frazon trovotan vi povos legi:
Aminda — edzino — embaraso — malvera — libero — nenian — ŝtranko — celon.

PROBLEMO 50^a (DE GEYER).

O L A

PROBLEMO 51^a (DE K. K. RIKO).

Kun B mi estas ŝatata de Zamenhof, kun K mi estas veturilo fine kun Ĉ oni min manĝas.

PROBLEMO 52^a (DE LA SAMA).

Mi estas besto malbona; nur eraro de la kompostisto pri loko de unu litero, tuj mi vin amuzas.


PROBLEMO 53^a (DE LA SAMA).

Kiu estas la kuzo de la nepo de la patro de la onklo de mia patro.

PROBLEMO 54^a (DE ALAH BEN CRUSTERJEN).

- Anrolo'djssroibue •
- Vertikale:teraĵo — horizontale: • • • • •
- aro kaj fermiloj. •
- • • • •
-

PROBLEMO 56^a (DE X...)



Dividu tiun rektangulon en 4 aliaj egalaj; faldante, kaj ne tranĉante, ĉiu el ili, formu 4 kvadratojn apudmetu tiujn ĉi lastajn konvene, vi formos kvadratan enhavantan nomon universale konatan.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

- 1^o Ĉiuj problemoj proponotaj kaj solvoj, amuzajoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet, 9 cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « Miksaĵoj ». La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.
- 2^o Krom esceptoj speciale dirotaj, la solvoj devas esti sendataj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.
- 3^o Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.
- 4^o Por ia'j konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adrestu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponotajn problemojn.

Inter geedzoj.

- Ni iru hodiaŭ, mia kara, teatron.
- Kaj, kion oni prezentadas en ĝi?
- « Familian Feliĉon »...
- Nepre, ni iru, ĉar ni delonge ne vidis familian feliĉon...
Esp^o 9357.

- Edzo revenas hejmen kaj trovas preĝantan sian edzinon.
- Kial vi preĝas? diris li.
- Por via bonfarto kaj longa vivo.
- Kiel? ĉu vi ne diras ke vi malamas min?
- Jes, ja, sed mia unua edzo vangfrapis min, vi nur baston- batas min, tial mi timas ke la tria mortigos min!
10072.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARA BONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

LA BELGA SONORILLO.

Bonega propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Unu el la plej malnovaj kaj seriozaj gazetoj Esperantaj. Sciigoj — Literaturo — Scienco

Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Cox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava monata revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonege redaktata sub direktado de A. Jimenez Loira. Rakontoj pri hispanaj kutimoj kaj tradukoj laŭ famaj hispanaj aŭtoroj. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

ESPERO PACIFISTA.

Monato organo de l'Esperantista Societo por la *Paco*. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

UNUA PAŜO.

Monata bulgara gazeto en Esperanto. Priraktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^{ro} S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofio, Bulgarie.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

Sendu mendojn kaj anoneojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de *Tra la Mondo* », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT: EUGÈNE CAPÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto.

Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l'komenciĝo de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lartiga, Lima (Peruo).

ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe So L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe S^{ro} Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; sociala politika fakoj; novaj famaj beletristikaĵoj (inter alie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membrigo en la S-to «Espero») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S^{to} «Espero.»

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille-a sistemo. 3 f. — Ĉe So Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N^o afrankita 0 f. 50 Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — Dro L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fakoj, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

Sinjorinoj!

Se vi volas ne plu suferi je la monataj sangel-fluoj aŭ je la epoko de ilia malapero, ensorbu la

DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendaĝeran produktaĵon, bombonforman, kiu tuj kaj certe forigas la doloron.

Por havigi la Dragées Blottière, sendu 2,25 fr. poŝt-aŭ kartmandate, 102, Rue Richelieu, PARIS.

Les Annales politiques

et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.
Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l'reciproka apogo de Annales).

Fervojoj de Paris ĝis Liono kaj Mediteraneo.

La nova rapida servado franca-itala per « Simplon » komencis la 31^{an} de Majo.

Ĝi konsistas el du foriroj el Parizo P. L. M. ĉiutage; unu je 2 h 30 m posttagmeze (Alveno en Milanon, la morgaŭon je 7 h 5 m matene, en Venezion je 5 m. post tagmezo); l' alia je 10 h 30 m vespere (Alveno morgaŭe en Milanon je 4 h 10 m vespere, en Venezion je 11 h 33 m. vespere).

Lit'-vagonoj, lit'-salonoj, 1^a kaj 2^a klasoj kaj restoraci'-vagonoj. Plue, luksa vagonaro « Simplon-Ekspres » (lit'- kaj restoraci'-vagonoj) deiras de Parizo-P. L. M. tri fojojn ĉiusejmane, la Lundon, Merkredon kaj Sabaton je 7 h. 40 vespere (Alveno morgaŭe en Milanon je 32 m. post tagmezo, en Venezion je 6 h. 45 m. vespere).

La kelkatempa rapida servado el Vichy' kaj Clermont' (Royat') komencis la 6^{an} de Junio.

De tiu dato la rapida vagonaro 927 (1^a klaso kaj restoraci'-vagono) forlasas Parizon-P. L. M. je 11 h. 10 m. matene kaj alvenas en Vichy' je 5 h. 05 m., en Clermont' je 6 h. 04 m. vespere.

Plue, la luksa vagonaro « Vichy-Ekspres » (salon'-vagono kaj restoraci'-vagono) okazas 3 fojojn semajne de la 16^{an} de Junio, la Markon Jaudon kaj Sabaton).

Deiro de Parizo je 3 h. 55 m. post tagmezo; alveno en Vichy' je 8 h. 52 m. vespere, en Clermont' (Royat'), per korespondo, je 10 h. 36 vespere.

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de: Alĝerio;

l f., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo » fr. 1,50 ĉiu centoj.

ĈE « TRA LA MONDO ».